

Fabeloj

de

August Strindberg

traduko:

Gunnar Gällmo

Origina titolo: *Sagor*

© originalo: libera (la aŭtoro mortis en 1912)

© traduko: Gunnar Gällmo 2022

Enhavo:

En somermezaj tempoj	4
La granda gruzoharpo	19
La dormeganto	25
La malfacilaĵoj de la piloto	33
Fotografio kaj filozofio	48
Duona paperfolio	52
La triumfanto kaj la ŝercanto	55
Kiam la ligna hirundo venis en la kapran pomarbon	65
La sekretoj de la tabaka budego	77
La sagao de Sankta Gothardo	85
Jabalo sen mi	99
La oraj helmoj en Ålleberg	109
La liceno trovas la Orpudron	120

En somermezaj tempoj

En meznoktaj tempoj, kiam la grundo edziniĝas en la nordaj landoj, kiam la tero ĝojas, kiam la fonto ankoraŭ eksplodigas, kiam la floroj de la herbejo staras rektaj kaj la birdoj kantas, ĝuste tiam la kolombo venis el la arbaro kaj eksidis ekster la domo kie kuŝis en la lito la naŭdekjara patrino.

La maljunulino kuŝis dum dudek jaroj, kaj ŝi povis tra la fenestro vidi ĉion kio okazis sur la korto, uzata de ŝiaj du filoj. Sed ŝi vidis la mondon kaj la homojn laŭ sia aparta maniero, ĉar la fenestraj vitroj portis ĉiujn kolorojn de la ĉielarko; ŝi devis nur iom turni la kapon, kaj ŝi vidis ĉion sinsekve: ruĝe, flave, verde, blue, viole. Se do estis vintra tago, kiam la arboj portis prujnon kvazaŭ ili portus blankajn arĝentfoliojn, tiam ŝi turnis la kapon sur la kuseno, kaj la arboj iĝis verdaj; estis somero, la kampo iĝis flava, la ĉielo iĝis blua, eĉ se ĝi estis griza en si mem. Tiel ŝi kredis sin povi sorĉi; kaj ŝi neniam enuis. Sed la magiaj fenestroj havis ankaŭ alian donacon, ĉar ili estis konveksaj, kaj do montris kion estis ekstere aŭ grandigita aŭ malgrandigita.

Kiam do ŝia granda filo venis hejmen kaj estis malica, kriante ekstere sur la korto, la patrino deziris ke li denove estus eta kaj ĝentila; kaj tuj ŝi vidis lin tiel eta. Aŭ kiam la nepoj paŝetis tie

ekstere, kaj ŝi pensis pri ilia estonteco, tiam – unu, du, tri – ili venis en la grandigan vitron, kaj ŝi vidis ilin plene kreskintajn, verajn gigantojn.

Sed kiam la somero komenciĝis, tiam ŝi malfermigis la fenestron; ĉar kiel bele kiel estis tiam tie ekstere, tiel la fenestroj ne povis montri. Kaj nun en la somermeza antaŭtago, kiam estis plejeble bele, ŝi kuŝis kaj rigardis eksteren al la herbejo kaj al la bosko, kiam la kolombo ekkantis. Ŝi kantis tiel bele pri Jesuo Kristo kaj pri la ĝojo kaj gloro de la ĉielo, kaj ŝi bonvenigis ĉiujn subpremitajn, kiuj havis sufiĉe de la suferoj de ĉi tiu vivo.

La maljunulino aŭskultis, sed ŝi tre dankis, ĉar la tero hodiaŭ estis same bela kiel la ĉielo, kaj ŝi ne deziris ion pli bonan.

Tiam la kolombo flugis super la herbejo, en la montan arbareton, kie la frato de la terkulturisto staris kaj fosis fonton. Li staris profunde en la tero kun tri ulnoj super la kapo, ĝuste kiel en sia tombo.

La kolombo eksidis en piceo kaj kantis pri la ĝojo de la ĉielo, certa ke la viro profunde en la tero, kiu vidis nek la ĉielon, nek la maron, nek la herbaron, sopiris iri supren.

"Ne," diris tiu, "mi devas unue fosi fonton; ĉar se ne, mia somera gasto ne havos akvon, kaj tiam la eta malgaja edzino foriros kun sia infano."

La kolombo flugis al la marbordo, kie la frato de la terkulturisto ĝuste prenis retojn, kaj ŝi sidiĝis en la kanoj por kanti.

"Ne," diris la frato de la terkulturisto, "mi devas enigi manĝaĵojn en la domon, se ne la infanoj krios pro malsato! Poste! Poste! Ĝustatempe la ĉielo! Unue la vivo, poste la morto!"

La kolombo flugis al la granda domo, kie la eta malgaja edzino loĝis dumsomere. Ŝi nun sidis en la verando kaj kudris per la manmaŝino; blanka kiel lilio ŝi estis sub la ruĝa feltĉapelo, kiu kiel papavo kuŝis sur ŝiaj nigraj haroj, nigraj kiel funebra krepvualo. Ŝi estis kudronta belan antaŭtukon al la etulino, uzotan dum la somermeza antaŭtago, kaj la infano sidis ĉe ŝiaj piedoj kaj distondis ŝtoferojn kiujn ŝi ricevis.

"Kial paĉjô ne venas hejmen?" ŝi demandis.

Tio estis ĝuste la malfacila demando, al kiu la juna patrino mem ne povis respondi, kaj verŝajne ankaŭ ne la patro, kie li en fremda lando prizorgis sian suferon, kiu estis duoble tiel granda kiel tiu de la patrino.

La kudromaŝino funkciis malbone, sed ĝi pikis kaj pikis; tiel multajn pikojn kiujn homa koro povas elteni, antaŭ ol ĝi mortas pro maltro da sango; kaj ĉiu kudrero ligis la fadenon eĉ pli firme – kiel strange!

"Mi volas iri al la vilaĝo hodiaŭ, panjo!" diris la etulino, "kaj mi volas vidi la sunon, ĉar ĉi tie estas tiel mallume."

"Vi rajtos iri al la suno posttagmeze, infaneto!"

Ĉar estis mallume inter la altaj rokoj sur ĉi tiu bordo de la insulo; kaj la domo estis meze inter nigraj piceoj, kiuj baris la vidadon, ankaŭ al la maro.

"Kaj mi volas ke vi aĉetu al mi multajn ludilojn, panjo."

"Ho infano, ni havas tiel malmulte kun kio pagi!" respondis la patrino, kaj klinis la kapon pli profunde al la brusto.

Kaj tio estis la vero, ĉar anstataŭ riĉaĵojn oni havis malfacilaĵojn; neniun serviston ili havis somere, kaj la patrino devis fari ĉion mem.

Sed kiam ŝi nun vidis la malgajan mienon de la infano, ŝi levis ŝin al siaj genuoj.

"Metu viajn brakojn ĉirkaŭ mia kolo!" ŝi diris.

La etulino faris tiel.

"Donu al panjo kison!"

Ŝi ricevis ĝin per eta buŝo duone malferma, kiel tiu de birdido; kaj kiam la patrino ricevis rigardon el tiuj okuloj, bluaj kiel la floro de la lino, tiam ŝia bela vizaĝo reflektis la senkulpecon de la infano, kaj ŝi mem aspektis kiel feliĉa infano en sunlumo.

"Ĉi tie mi ne kantas pri la ĉielo," la kolombo pensis, "sed mi povas servi al ili, tiel mi faros."

Kaj ŝi flugis al Sunvilaĝo, kie ŝi havis ion por fari.

Nun iĝis posttagmezo; la eta sinjorino metis la korbon surbrake kaj la infanon enmane por iri. Ŝi neniam antaŭe estis en la vilaĝo, sed ŝi sciis ke ĝi situas proksime al la sunsubeniro, je la alia flanko de la insulo; kaj la terkulturisto diris ke oni devas pasi ses palisarojn kun ses pordoj, antaŭ ol oni venos tien.

Kaj ili iris.

Unue venis pado kun ŝtonoj kaj arboradikoj, do estis necese porti la etulinon, kaj tio pezis sufiĉe. La kuracisto malpermesis al la infano lacigi sian maldekstran piedon, ĉar ĝi estis tiel malforta ke ĝi facile kreskus kurbe.

La juna patrino malfacile portis sian karan ŝarĝon; kaj la ŝvitogutoj fluis suben laŭ ŝia vizaĝo, ĉar estis varmege en la arbaro.

"Mi tiam soifas, panjo!" plendis la eta knabino.

"Amata infano, havu paciencon, kaj vi ricevos akvon kiam vi venos tien."

Kaj ŝi kisis la sekajn lipojn de la etulino, kaj tiam la infano ridetis, forgesante sian soifon.

Sed la suno brulis kaj la aero ne moviĝis en la arbaro.

"Nun vi provu iri iomete," diris la patrino kaj metis la infanon surteren.

Sed la eta piedo cedis, kaj la infano ne povis iri.

"Mi estas tiel laca, panjo!" la infano plendis, kaj sidiĝis por plori.

Sed surtere kreskis la plej belaj keloj roze ruĝaj, odorantaj de migdaloj; kaj la infano neniam antaŭe vidis tiajn florojn; kaj ŝi ridetis denove, kaj tial la patrino havis pli fortan menson kaj povis pluiri kun la infano surbrake.

Nun ili estis ĉe la unua pordo, kaj iris tra ĝi, kaj zorgeme refermis ĝin.

Tiam estis aŭdata krio kiel laŭta henado; kaj senliga ĉevalo venis kurante, ekstaris meze sur la vojo kaj kriis; kaj lia krio ricervis respondon en la arbaro dekstre kaj maldekstre kaj ĉirkaŭe; kaj bruas en la tero, en brakoj kaj en ŝtonoj. Kaj la forlasitaj staris tie meze inter senligaj ĉevaloj.

La infano kaŝis sian vizaĝon ĉe la brusto de la patrino, kaj ŝia eta koro batetis pro angoro, kiel horloĝo.

"Mi tiom timas!" ŝi flustris.

"Ho dio en la ĉielo, helpu nin!" preĝis la patrino.

Tiam oni aŭdis merlon kanti inter la piceoj; kaj vidu, samtempe la ĉevaloj forkuris en malsamajn direktojn; kaj denove estis silente.

Kaj ili atingis la duan pordon kaj refermis ĝin.

Tie estis ripoziga palisaro; kaj la suno brulis pli varme ol en la arbaro. La terbuloj kuŝis grizaj en longaj vicoj; sed en deklivo, ili subite vidis la terbulojn moviĝi, kaj estis la dorsoj de ŝafoj.

Ŝafoj estas ĝentilaj bestoj, precipe la ŝafidoj, sed kun la virŝafo oni ne ludu, ĉar li estas maliculo kaj volonte atakas tiujn kiuj faris nenion malbonan al li. Kaj nun li ekstaris meze sur la vojo, saltinte super la fosaĵo. Li klinis sian kapon kaj iris retroen.

"Mi tiom timas, panjo," diris la etulino; kaj ŝia koro batis.

"Ho dio gracia en la ĉielo, helpu nin!" suspiris la patrino kaj rigardis petante al la blua volbo.

Kaj tie ripozis, flirtanta kiel papilio, eta alaŭdo; kaj kiam ŝi ekkantis, la virŝafo malaperis inter la grizaj terbuloj.

Poste ili venis al la tria pordo. Nun la grundo komencis iri pli malsupre; iĝis malseke ĉirkaŭ la piedoj, kaj tie estis marĉo. La tufoj aspektis kiel tombetoj kun blankaj floroj, lanaj aŭ kotonaj floroj; kaj oni devis iri ĝuste por ne sinki en la ŝlimo. Tie kreskis nigraj beroj, kun veneno, kaj ilin la infano volis pluki, sed ne rajtis, kaj tial ŝi iĝis malgaja, ĉar ŝi ne komprenis kio estas venena.

Kiam ili iris, ili vidis iun blankan tukon, tiritan inter la arboj; la suno iĝis kaŝata, kaj iĝis blanka mallumo ĉirkaŭ ili, terura.

El la blanka nun videblis kapo kun blanka stelo kaj du kurbaj kornoj, kaj la kapo blekis. Kaj videblis pli da kapoj, multaj, kaj ili venis ĉiam pli proksimen.

"Mi timas, panjo," flustris la infano. "Mi timas."

La patrino faris paŝon flanken kaj sinkis inter du tufoj en la marĉo.

"Ho dio, granda, gracia, kompatu min!" la patrino kriis el la profundo de sia animo.

Kaj nun oni aŭdis la venton, la fortan marventon, iri tra la arbaro; la arboj humile klinis sin antaŭ la granda spirito, kaj juna pino precipe; el ĝiaj branĉoj, io flustris en la orelon de la forlasita; kaj kiam ŝi kun unu mano prenis branĉon, tiam la pino rektiĝis kaj levis la senesperan el la ŝlimo.

La nebulo tiam tuj malaperis; la suno denove brilis, kaj ili staris ĉe la kvara pordo. Sed la patrino, kiu perdis sian ĉapelon, sekigis la larmojn de la infano per siaj nigraj haroj; kaj kiam la etulino ridetis pri tio, tiam estis lumo en la patrino koro; ŝi forgesis ĉiun pasintan malbonon, kaj ŝi ricevis novajn fortojn por atingi la kvinan pordon. Tiam iĝis pli lume en la menso, ĉar ŝi vidis ruĝajn brikotegmentojn kaj sovaĝajn rozojn, po du, ĝuste kvazaŭ ili ŝatus unu la alian, la blanka viburno kaj la lumruĝa sovaĝa rozo.

La etulino nun povis iri; kaj ŝi plenigis la korbon per floroj, en kiuj la pupo Lisa dormos la mezsomeran nokton por havi belajn songojn.

Tiel ili ludis sian vojon, denove senzorgaj; ĉar restis al ili nur unu betularo, kaj ili estos tie. Nun la vojo kliniĝis iomete supren; kaj kiam ili estis irintaj tien kaj dekstren, la virbovo staris meze en la vojo.

Ne eblis fuĝi, kaj frakasita, la patrino falis surgenuen, metis la infanon sur la tero antaŭ si, klinis sian kapon protektante super ĝi; kaj kun streĉitaj manoj, ŝi silente preĝis. El ŝia frunto, la angora ŝvito gutis kiel ruĝa sango, kaj falis al la tero.

"Ho dio," ŝi preĝis, "prenu mian vivon, sed ne tiun de la etulino!"

Tiam ŝi aŭdis flugilojn frapi en la aero, kaj kiam ŝi rigardis tien, blanka kolombo flugis al la vilaĝo; sed la virbovo estis for.

Kiam ŝi rigardis sian infanon, la etulino sidis ĉe la vojrandoj kaj kolektis fragojn, same ruĝajn kiel sangogutoj; kaj tiam ŝi komprenis de kie ili venis.

Ili iris tra la lasta pordo kaj direkte al la vilaĝo.

En sunlumo ĝi kuŝis, ĉe verda golfo, sub grandaj tilioj kaj aceroj; kaj sur monteto videblis la blanka preĝejo kun la ruĝa kampanilo; la pastrejo en siringoj, la poŝta domo en jasmenoj kaj tiu de la ĝardenisto sub granda kverko. Ĉio

kuŝis tie tiel lume, la flagoj estis blovataj, malgrandaj boatoj kuŝis ĉe bordoj kaj pontoj, kaj oni vidis ke estis la somermeza antaŭtago.

Sed ili renkontis neniun homon. Nun ili unue iros al la vendejo por aĉeti, kaj tie la etulino ankaŭ ricevos ion por trinki.

Kiam ili venis tien, la vendejo estis ŝlosita.

"Mi tiom soifas, panjo," la infano plendis.

Ili iris al la poŝto! – Tie estis ŝlosita.

"Mi tiom malsatas, panjo."

La patrino estis muta, ĉar ŝi ne komprenis kial estis ŝlosite dum labortago; kaj kial oni vidis neniujn homojn. Ŝi iris al la ĝardenisto. Estis ŝlosite, kaj granda hundo kuŝis antaŭ la pordo.

"Mi estas tiom laca, panjo."

"Ankaŭ mi, infano mia, sed ni devas serĉi akvon."

Kaj ili iris de domo al domo, sed estis ĉie ŝlosite; kaj la infano ne plu povis iri, ĉar ĝia eta piedo estis tiel laca ke ŝi lamis. Kiam la patrino vidis la belan formon klini sin, tiam ankaŭ ŝi laciĝis kaj sidiĝis sur la vojrandoj kun la infano surgenue. Kaj la etulino ekdormis.

Tiam oni aŭdis kolombon kanti en la siringoarbustoj; kaj ŝi kantis pri la ĝojo de la ĉielo kaj pli la eternaj suferoj de la tero.

Sed la patrino rigardis sian dormantan infanon kaj ĝian etan vizaĝon, borderitan per blankaj

puntoj similaj al la folioj de la blanka lilio. Kaj ŝi kredis sin posedi la ĉielon en siaj brakoj.

Sed la infano vekigis kaj petis trinkaĵon.

La patrino restis muta.

"Mi volas iri hejmen, panjo," la etulino plendis.

"La saman teruran vojon reen? Neniam! Mi preferas iri en la maron," la patrino respondis.

"Mi volas iri hejmen!"

La patrino ekstaris. Ŝi vidis ke junaj betuloj videblis malantaŭ kabo; kaj dum ŝi rigardis ilin, la arboj komencis moviĝi kaj iri. Tiam ŝi komprenis ke tie estis homoj, kiuj plukis betulajn foliojn al la foli-salonoj de la somermezo; kaj ŝi ekiris tien, kie ŝi trovos akvon.

Survoje tien, ŝi ekvidis dometon ene de verda palisaro kun blanka pordo; tie la pordo estis malfermita kaj ĝentile invita. Ŝi eniris tra la pordo kaj venis al ĝardeno kun peonioj kaj akvilegioj. Nun si rimarkis ke la ĝardenoj kovris la fenestrojn, kaj ili ĉiuj estis blankaj. Sed en la subtegmenta kamero, unu fenestro estis malfermita, kaj inter du balzaminoj aperis blanka mano kaj movis blankan tukon, kvazaŭ al iu vojaĝonta.

Ŝi iris al la dom-angulo, kaj tie en la altaj herboj kuŝis krono de verda mirto kun blankaj rozoj. Sed ĝi estis tro granda por esti krono de estonta edzino.

Do ŝi eniris la antaŭĉambro kaj demandis ĉu iu estis tie.

Aŭdinte neniun respondon, ŝi eniris la domon. Sur la planko staris, meze en floraro, granda ŝtofejo kun arĝentaj piedoj. Kaj en la kesto kuŝis juna knabino kun edzina krono surkape.

La muroj en la ĉambro konsistis el novaj pinoplankoj, nur oleo vernisitaj, do oni povis vidi ĉiujn branĉetojn. Kaj en la oblongaj branĉotruoj, oni vidis la mallumajn, forsekigitajn branĉetojn kiel okulojn.

La infano unue rimarkis la strangajn murojn kaj diris:

"Vidu kiel multaj okuloj, panjo."

Jes, tie estis ĉiuspecaj okuloj; grandaj elokventaj kaj seriozaj; malgrandaj, brilantaj infanokuloj kun rideto en la angulo; malicaj okuloj, kiuj montris tro de la blanka; malfermitaj, maldormantaj okuloj, kiuj esplorante rigardis la koron; kaj tie sidis granda, milda patrino okulo, kiu amplene rigardis la mortintan knabinon, kaj en tiu okulo pendis klara larmo de pina rezino, kiu pro la radioj de la subeniranta suno brilis ruĝe kaj verde kiel diamanto.

"Ĉu la knabino dormas?" demandis la infano, kiu nun ekvidis la mortinton.

"Jes, ŝi dormas."

"Ĉu ŝi estas estonta edzino, panjo?"

"Jes, ŝi estas estonta edzino."

La patrino ekkonis ŝin! Estis la knabino, kiu edziniĝos somermeze, kiam la maristo venos hejmen; sed kiam la maristo skribis, ke li povos veni nur aŭtune, tiam ŝia koro krevis; ĉar ŝi ne volis atendi ĝisaŭtune, kiam la arboj faligos siajn foliojn kaj komencos ŝtormi.

Ŝi aŭskultis la kanton de la kolombo kaj komprenis ĝin. Kiam nun la juna patrino ekiris, ŝi sciis kien ŝi devas iri.

Ŝi metis la pezan korbon ekster la pordo kaj prenis la infanon en siaj brakoj; ekiris al la venonta herbejo, inter ŝi kaj la marbordo. Estis maro de floroj, kiuj susuris kaj flustris ĉirkaŭ ŝia larĝa jupo, kolorigita de ĉiaj polenoj; burdoj, abeloj kaj papilioj levis la flugilojn kaj flugis antaŭ ili, kantantaj en unusola multkolora or-nubo. Al la marbordo ŝi iris per leĝeraj paŝoj.

Tiam ŝi vidis en la golfo blankan velboaton, kiu venis kun streĉitaj veloj rekte al la ponto, sed neniu videblis ĉe la direktilo. Kaj ŝi vadis plu, en floroj kaj iliaodoro, tiel ke ŝia blanka jupo aspektis kiel floraro, sed kun multe pli bonaj koloroj.

Malsupre inter la salikoj de la marbordo, ŝi haltis; tie estis birdonesto inter trunko kaj branĉo; kaj kiam la arbon movis vespera vento, ĝi lulis tri birdetojn, kiujn la etulino tuj volis karesi.

"Ne, infano mia," diris la patrino; "neniam tuŝu birdonestojn."

Kaj ĝuste kiam ili staris inter la ŝtonoj, albordiĝis la blanka boato, tuj apud iliaj piedoj, sed neniu homo estis en ĝi.

Tiam ŝi prenis la infanon kaj enboatiĝis. Kaj tuj, la boato turniĝis kaj ekiris el la golfo.

Kiam ili iris sub la preĝeja kabo, ĉiuj sonoriloj eksonis, sed tiel rapide kaj gaje.

Kaj la boato iris el la golfo kaj al la granda akvaro, kie la malfermita maro videblis.

La knabineto lumis pro ĝojo, ĉar la akvo estis tiel blua kaj trankvila; kaj ne plu en akvo ili iris, sed en linfloroj, kiujn la infano kolektis per sia elstreĉita mano.

Kaj la floroj klinis sin kaj leviĝis kiel ondetoj, frustrantaj al la boatbordo. Senfine la linkampo ŝajnis disvastiĝi antaŭ ili; sed poste, ilin kovris blanka nebulo, kaj ili aŭdis verajn ondojn. Sed super la nebulo aŭdiĝis la kanto de alaŭdoj.

"Kiel la alaŭdoj povas kanti sur la maro?" demandis la etulino.

"La maro estas tiel verda, ke la alaŭdoj kredas ke estas herbejo," respondis la patrino.

Nun la nebulo denove estis dispelata; la ĉielo estis blua kiel linkampo, kaj la alaŭdoj leviĝis.

Tiam ili ekvidis, meze en la maro, verdan insulon kun blankaj sablobordoj, kie blanke vestitaj homoj iris manenmane. Kaj la subeniranta suno lumis sur la ora tegmento de portiko, kie blankaj fajroj brulis sub sanktaj

oferbovtoj; kaj super la floranta insulo sin etendis
ĉielarko roze ruĝa kaj kane verda.

"Kio estas tio, panjo?"

La patrino ne povis respondi.

"Ĉu estas la ĉielo, pri kiu la kolombo kantis?
Kio estas la ĉielo, panjo?"

"Estas loko, ho infano, kie ĉiuj homoj estas
amikoj," respondis la patrino; "kie ne estas
ĉagreno kaj malpaco."

"Do tien mi volas veni," diris la infano.

"Tion volas ankaŭ mi," diris la laca, forlasita,
elprovita patrino.

La granda gruzoharpo

Iam kuŝis lojto kun sia filo sur la lagofundo apud la albordiĝejo por vaporŝipoj, kaj vidis kiel knabo ordigis sian fiŝkaptilon por uzi ĝin.

"Vidu tiun!" diris la lojto, "kaj vi lernos ion pri la malbono kaj kaptilo de la mondo... Nun vidu lin; li havas vipon enmane, kaj li elĵetas la rimenon; jen ĝi! Kaj venas la bastono, kiu tiras suben; jen ĝi; sed poste venas la hoko kun serpento! Tiun vi ne prenu en la buŝo, ĉar tiam vi estos kaptita! Nu, nur stultaj perkoj kaj plotoj lasas sin trompi. Nun vi scias tion!"

Sed nun, la fukaro kun mituloj kaj helikoj komencis balanciĝi; kaj oni aŭdis plaŭdadon kaj tamburadon, kaj granda, ruĝa baleno moviĝis super iliaj kapoj; li havis voston naĝilon similan al korkotirilo, per kiu li laboris.

"Estas la vaporŝipo!" diris la maljuna lojto. "Donu lokon!"

Kaj supre estis terura bruo. Estis pezaj paŝoj, kiam ili dum du sekundoj faris ponton inter boato kaj tero. Sed estis malfacile vidi, ĉar ili supre ĵetis fulgon kaj oleojn.

Sur la ponto estis io tre peza, pro kio ĝi kantis, kaj kelkaj viroj ekkantis:

"Ho puŝu ĝin! – Hoho kun ĝi! – Ho kune prenu! .. Hoho kun ĝi! – Ordigu ĝin! – Hoho kun ĝi!"

Nun okazis io tute nepriskribebla. Unue sonis kiel kiam sesdek dalekarlianoj hakas lignon; poste, malfermiĝis truo en la akvo, ĝis la lagofundo, kaj inter tri ŝtonoj staris nigra ŝranko kiu kantis kaj ludis grandsone, tute proksime al la lojto kaj ŝia filo, kiuj iris en la profundon.

Nun estis aŭdata desupre voĉo, kiu kriis:

"Tri klaftoj da akvo! Ne eblas! Lasu ĝin resti, ĉar ne valoras la penon suprenigi la malnovan aĉaĵon kiu kostas pli ordigi ol valoras la penon."

Estis la estro, kies piano finiĝis en la lago.

Kaj iĝis silente; la granda ruĝa fiŝo eliris per batoj de la korkotirilo, kaj iĝis eĉ pli silente. Sed kiam la suno subeniris, komencis blovi; la nigra ŝranko malsupre en la fukaro balanciĝis kaj batis la ŝtonojn; kaj je ĉiu bato eksonis, kaj la proksimaj fiŝoj venis por vidi kaj aŭdi.

La lojto venis unue por vidi; kaj kiam ŝi povis speguli sin en la ŝranko, ŝi diris: "Estas spegula ŝranko!"

Tio estis logike, kaj tial ĉiuj diris: "Estas spegula ŝranko!"

Kaj venis gobiedo, kaj flaris la restantajn kandelingojn; kaj ankoraŭ restis kandeleroj en la ingoj. – "Tio taŭgas por manĝi," li diris, "se nur ne estus la rimeno."

Kaj venis granda moruo kaj kuŝiĝis sur la pedalo, kaj tiam ekbruis en la ŝranko, kaj ĉiuj fiŝoj fuĝis.

Dum tiu tago, ili ne atingis pli.

Nokte iĝis duona ŝtormo, kaj la ludoŝranko bruis kiel la servistino de la ŝtonkonstruanto ĝis venis la suno. Tiam, kiam la lojto revenis kun la tuta aro, la ŝranko ŝanĝiĝis.

Kiel ŝarkobuŝo, la kovrilo malfermiĝis; tie estis videbla dentaro tiel granda ke ili neniam vidis ion similan; sed ĉiu dua dento estis nigra. Kaj la flankoj de la tuta maŝino kreskis, kiel ĉe fiŝo plena de frajo; la plankoj disbatis, la pedalo iris supren kiel batanta piedo, la brakoj de la kandelingoj fermiĝis kiel pugnoj. – Ĝi estis terura!

"Ĝi disiras!" kriis la moruo kaj elmetis naĝilon, preta turni sin.

"Ĝi disiras!" kriis ĉiuj.

Kaj nun malfiksiĝis la plankoj, la kesto malfermiĝis, kaj oni vidis la internon, tio estis la plej amuza de ĉio.

"Estas naso! Ne iru tien!" diris la lojto.

"Teksilas estas!" diris la dornfiŝo, kiu kroĉtrikas sian neston kaj komprenas kio estas teksilo.

"Gruzoharpo," diris la perko kiu kutime loĝis sub la kalkfarejo.

Jes, gruzoharpo estis! Sed estis ene tiom da aferoj, ke ne similis al la maŝino per kio ili harpis gruzon. Estis etaĵoj similaj al piedfingroj en blankaj lanŝtrumpoj; kaj kiam ili moviĝis, tiam

iris piedo kun cent ostaj fingroj; iris kaj iris, sed neniam forlasis la lokon.

Estis stranga korpo. Sed la ludo finiĝis, ĉar la ostoj ne plu atingis la kordojn, sed movis la fingrojn en la akvo, kvazaŭ por povi eniri.

La ludo finiĝis! Sed tiam venis dornfiŝaro kaj iris rekte tra la ŝranko. Kaj kiam ili tiris siaj dornojn super la kordoj, tiam ĝi denove ludis, sed alimaniere, ĉar nun la kordoj estis malsame agorditaj.

Dum roza somervespero baldaŭ poste, du infanoj sidis sur la ponto por la vaporŝipo, knabo kaj knabino. Ili fakte ne pensis pri io ajn, eble pri io petolado; tiam subite aŭdiĝis malrapida muziko el la lagofundo, kaj ili iĝis seriozaj.

"Ĉu vi aŭdas?"

"Jes. Kio estas? Ili ludas gamojn."

"Ne, kantas la kuloj."

"Ne. Estas la marvirineto."

"Ne ekzistas marvirineto, la instruisto diris."

"Pri tio, la instruisto nenion scias."

"Jes, sed tamen aŭdu."

Ili aŭskultis dum longa tempo, kaj poste ili foriris.

Du novvenintaj bangastoj eksidis sur la ponto. Li rigardis ŝiajn okulojn, kiuj spegulis la tutan rozkoloran sunsubeniron kaj la verajn bordojn. Tiam ili aŭdis muzikon kiel de vitroharmoniko,

sed en novaj tonaloj, tiajn kiujn nur ili songis, ili kiuj volis fari novaĵojn surtere. Sed ili ne havis la ideon serĉi ekster si mem, ĉar ili kredis ke io kantis ene de ili.

Tiam venis du malnovaj bangastoj, kiuj konis la trukon; kaj por sia amuzo, ili diris laŭte:

"Estas la sinkinta fortepiano de la montestro."

Sed tuj kiam venis novaj bangastoj, kiuj ne konis la perfidon, ili sidis kaj ĝojis pro la nekonata muziko, ĝis venis pli maljunaj bangastoj kaj informis ilin pri la perfido. Poste ili ne plu ĝojis.

Sed la ludŝranko kuŝis tie dum la tuta somero; kaj la dornfiŝo instruis sian arton al la perkoj, kiuj kabablis pli. La piano iĝis perk-loko por la bangastoj; la pilotoj metis retojn ĉirkaŭ ĝi, kaj pedelo dum iu tago provis tie kapti moruojn. Subeniginte la moru-fadenon kun la malnova pesaĵo kaj provante tiri ĝin supren, li aŭdis tonkuron en x-minoro, kaj la hoko estis fiksita. Li movetis kaj tiris, kaj fine li ekhavis kvin fingroostojn kun lano sur la pintoj, kaj bruis la ostoj kiel skeleto. Tiam li timis kaj ĵetis la aferon en la lagon, kvankam li ne sciis kio estis.

Poste venis la hundotagoj, kiam la akvo iĝis varma kaj ĉiuj fiŝoj iris al profunda akvo por serĉi malvarmon. Kaj denove silentiĝis la muziko. Sed venis la aŭgusta luno, kaj la bangastoj havis boatfeston. En blanka boato sidis

ankaŭ la montestro kaj lia edzino; kaj ilin malrapide remis tien kaj reen iliaj knaboj. Kiam ili remis sur la nigra akvo, kovrita de iom da oro sur la surfaco, ili aŭdis muzikon sub la boato.

"Hoho!" diris la estro, "ja estas nia malnova pianaĉo! Hoho!"

Sed tie li silentiĝis, kiam li vidis sian edzinon klini sian kapon profunde al la brusto, kiel oni vidas la pelikanojn sur bildoj, kvazaŭ ŝi volus mordi sian bruston kaj kaŝi sian vizaĝon.

La malnova piano kaj ĝia longa historio vekis ĉe ŝi memorojn el la profundo, de la unua manĝejo, kiun ili ornamis, de la unua infano, kiu lernis ludi, de la malgajo de la longvaj vesperoj, forĉaseblaj nur per la ŝturmantaj tonamasoj, pro kiuj la tuta loĝejo ekmaldormis, kiuj novagordis la humorojn kaj donis novan brilon al la mebloj... Sed tiu rakonto ne havas lokon ĉi tie.

Sed la aŭtuno estis veninta kun la unua ŝtormo, tiam venis miloj da haringetoj kaj naĝis tra la ludŝranko. Tio vere estis adiaŭa muziko; hirundoj kaj mevoj kolektiĝis por aŭskulti. Kaj dum tiu nokto, la ludŝranko vojaĝis al la maro; kaj post tio, ĉio estis finita.

La dormeganto

La orkestrestro Kreuzberg estis ulo, kiu ŝatis dormi matene, kaj ĉar li ludis en orkestro dum la vesperoj, kaj ĉar li trinkis pli ol unu glason da biero antaŭ la enlitiĝo. Li certe intencis ellitiĝi pli frue, sed li ne trovis tion farenda. Se li serĉis konatulon matene, tiu dormis; se li provis enmeti monon en la banko, ĝi estis ŝlosita; se li volis pruntepreni notojn en la muzikvendejo, ĝi ne estis malfermita, kaj se li bezonis iri en la trajno, ĝi ne komencis iri; droŝkon li ne povis havi tiel frue, eĉ ne sian snufon, nenion li povis fari tiel frue. Tial li estis kontenta dormi longe dum la matenoj, kaj li ja faris kiel li volis.

Nun li amis kaj sunon kaj florojn kaj infanojn; sed li ne rajtis loĝi en la suna flanko pro siaj bonaj instrumentoj, ĉar ili ne restis agordataj en sunplenaj ĉambroj. Do li luprenis loĝejon la unuan de aprilo, kaj ĝi estis en la norda flanko. Tion li bone kontrolis, ĉar li havis kompason ĉe la horloĝa ĉeno, kaj li sciis kie estis la Granda Urso vespere.

Ho, kaj iĝis printempo, kaj tiel varme ke estis vera beno loĝi norde. La dormejo estis apud la salono, kaj kie li dormis, tie ĉiam estis tute mallume pro persienoj; sed en la salono ne estis persienoj, ĉar tie ili ne estis bezonataj.

Kaj iĝis frusomero kaj verde. La orkestrestro manĝis kaj trinkis ĉe Hasselbacken, kaj tial li dormis multe kaj bone, precipe ĉar la teatro estis fermita ĝuste dum tiu tago.

Tamen, li dormis sufiĉe bone, sed en la ĉambro iĝis tiel varme, ke li plurfoje vekigis aŭ kredis fari tion. Unu fojon li kredis ke brulis en la tapeto, sed povis esti la Bourgogne kiun li trinkis; iam li sentis ion varmegan en la vizaĝo, sed certe estis la Bourgogne; kaj tial li turnis sin kaj denove ekdormis.

Kaj ellitiĝis je la duona post la naŭa, vestiĝis kaj eniris la salonon por malvarmigi sin per glaso de malvarma lakto, kiu ĉiam estis preta matene.

Sed hodiaŭ ne estis malvarme en la salono; tie estis preskaŭ varme, tro varme. Kaj la malvarma lakto ne estis freŝa; ĝi estis varmeta, malagrabla varmeta.

La orkestrestro ne estis grumblema, sed li ŝatis ĉie havi ordon. Tial li vokis la maljunan Lovisan, kaj kiel li agrable faris siajn rimarkojn la unuajn kvindeĵ fojojn – tiel li alparolis Lovisan agrable sed iom decideme, kiam ŝi metis sian kapon tra la pordo.

"Lovisa," li diris, "vi donis al mi malvarmetan lakton."

"Ne, mastro," Lovisa respondis, "ĝi estis malvarma, sed ĝi staris kaj iĝis malvarmeta."

"Do vi faris fajron! Ĉar en ĉi tiu ĉambro estas varme."

Ne, Lovisa ne faris fajron, kaj ŝi ofendite iris al sia angulo.

La lakto ja estis tolerebla; sed kiam la orkestrestro ĉirkaŭrigardis en la salono, li malgajiĝis. En angulo ĉe la piano, li ja faris hejman altaron de eta tablo kun du kandelingoj de arĝento, granda fotografio de juna virino, kaj antaŭ ĝi alta ĉampana glaso kun ora rando.

En tiu glaso, lia geedza glaso – li estis vidvo – li kutimis ĉiutage havi ruĝan rozon, memore kaj ofere al tiu, kiu iam estis la suno de lia vivo. Vintre kaj somere tie staris rozo, kaj vintre ĝi daŭris dum ok tagoj, nome se li tondis la suban finon kaj metis iom da salo en la akvo. Nun li lastvespere metis tute freŝan rozon en la akvo, och hodiaŭ ĝi estis velkinta, ŝrumpinta, morta, klinanta la kapon al la brusto. Tio estis malbona signo. Li ja sciis kiel fragilaj tiuj floroj estis, kaj li rimarkis ĉe kiuj homoj ili prosperis kaj ne prosperis. Li memoris kiel foje, kiam lia edzino vivis, ŝia rozo, kiun ŝi ĉiam havu sur sia eta kudrotablo, ne volis prosperi sed velkis tute neatendite. Kaj li rimarkis ke ĝuste tiam, lia suno kutimis iri malantaŭ nuboj, kiu dum malalta bruado disfalis al gutoj. La rozoj volis havi pacon kaj amplenajn vortojn, kaj ili ne toleris malmolajn sonojn. Muzikon ili amis, kaj li foje

ludis por la rozoj tiel ke ili malfermiĝis kaj ridetis.

Nun Lovisa havis malmolan menson, kaj ŝi kutimis grumbli al si mem dum ŝi ordigis la aferojn. Kaj ŝi havis kolerajn tagojn en la kuirejo, tiel ke la saŭco kazeiĝis kaj ĉiuj ceteraj manĝaĵoj ekhavis guston de malgajeco, kiun la orkestrestro tuj povis rimarki; ĉar li mem estis bona instrumento, kiu en la animo sentis tion kion aliaj homoj ne sentas.

Li tuj divenis ke Lovisa mortigis la rozon; eble ŝi kverelis al la povrulino, aŭ batis la glason, aŭ spiris malbone al la floro, kiu ne toleris tion. Tiam li denove vokis; kaj kiam Lovisa montris sian kapon, li diris, ne malĝentile, sed iom pli decideme ol antaŭe:

"Kion vi faris pri mia rozo, Lovisa?"

"Nenion, bona mastro!"

"Ĉu nenion? Ĉu vi kredas ke la floro mortas pro si mem? Vi ja vidas ke mankas akvo en la glaso! Ĝin vi elverŝis."

Ĉar Lovisa estis senkulpa, ŝi iris al la kuirejo kaj ploris, ĉar ja estas malgajige esti malĝuste akuzata.

La orkestrestro Kreuzberg, kiu ne toleris la ploron de aliaj, ne pli zorgis, kaj vespere acetis novan rozon, vere freŝan, sen ŝtaldratoj kompreneble, ĉiuj tiujn lia ekzino neniam toleris.

Kaj li enlitiĝis kaj ekdormis; ja kredis ke brulis en la tapeto kaj ke la kuzeno estis varmega, kaj reekdormis.

Kiam li la postan matenon iris en la salonon por adori ĉe la altaro de la hejmo – tiam, ho ve! la rozo kuŝis sen folioj ĉe la tigo.

Li volis preni la sonorileton, sed li haltiĝis, kiam li vidis la bildon de ŝi, kiun lia animo amis, kuŝi duone ruligita kaj falinta al la piedo de la florglaso.

Tion ne faris Lovisa! – En sia infaneca menso, li pensis: Ŝi, kiu estis al mi ĉio, mia konscienco kaj mia muzo, ŝi malŝatas min, ŝi koleras al mi; kion mi faris?

Jes, kiam li demandis sian konsciencon, tie ja estis, kiel ĉiam, etaj mankoj, kaj li decidis forigi ilin, iom post iom kompreneble.

Poste li faris oktagan vojaĝon; venis hejmen nokte kaj enlitiĝis. Vekiĝis iomete kiel kutime kun unu okulo kaj pensis ke brulis en la plafona lampo.

Kiam li poste iris en la salonon, tie estis eĉ varmege, kaj ĉio aspektis malbone. La kurtenoj estis palaj; ankaŭ la pianotuko perdis koloron; la kovriloj de la notlibroj estis torditaj; la keroseno en la plafona lampo vaporigis kaj pendis en minacanta gutoj sub la ornamo, kie la muŝoj kutimis danci; la akvo en la akvujo estis varma.

Sed plej malgaja de ĉio: ankaŭ ŝia bildo paliĝis, flaviĝis kiel la aŭtunaj herboj! Tiam li malgajiĝis. Kaj kiam li vere malgajiĝis li iris al la piano, aŭ al la violono, depende...

Ĉifoje li sidiĝis ĉe la piano, kun necerta intenco ludi la e-minoran sonaton, de Grieg kompreneble, kaj ŝian sonaton, la plej bonan kaj grandan ŝi sciis venis al la mondo post la d-minora de Beethoven, ne ĉar e venas post d, sed ĉar estis tiel!

Sed hodiaŭ, la piano ne volis obei. Ĝi estis malharmonia, malfunkcia, do li kredis ke liaj fingroj aŭ oreloj misfunkciis. Sed ne kulpis ili. La piano tutsimple estis neagordita, terure neagordita, kvankam la agordisto ĵus vizitis ĝin. Ĝi estis kvazaŭ malbonigita, magiita!

Tiam li prenis la violonon; kaj ĝin li nature devis agordi. Sed kiam li volis ordigi la plej altan kordon, la kejlo rifuzis; ĝi malsekiĝis. Kaj kiam la orkestestro vere provis, la kordo rompiĝis kun knalo kaj ruliĝis kiel seka angila haŭto.

Ne eblis!

Sed ke la bildo perdis koloron, tio estis pli malgajiga ol ĉio, kaj tial li metis vualon super la altaro.

Tiel venis vualo super la plej bela afero en lia vivo; kaj la orkestestro iĝis malbone agordita, cerbumis kaj ĉesis eliri vespere.

Kaj proksimiĝis la somermezo. La noktoj iĝis pli longaj ol la tagoj; sed ĉar la persienoj protektis la mallumon, la orkestrestro ne rimarkis iun ŝanĝon.

Fine dum certa nokto, ja la somermeza nokto, li vekigis ĉar la salona horloĝo sonigis dek tri batojn. Estis terure, kaj ĉar estis malfeliĉa nombro kaj ĉar vera horloĝo ne povas sonigi dek tri batojn. Nun li ne redormiĝis, sed kuŝis kaj aŭskultis. Knaletis en la salono, kaj knalis kiel kiam meblo fendiĝas. Tuj poste aŭdiĝis paŝetoj sur la planko, kaj la horloĝo ekbatis; kaj ŝi batis, kvindek batojn, kaj cent. Estis terure!

Sed nun venis lumfasko en la dormoĉambron kaj elĵetis formon sur la tapeto, strangan formon kiu similis al hokokruco; kaj ĝi venis el la salona pordo. Do estis lumo en la salono. Sed kiu lumigis? Kaj sonis glasoj, ĝuste kiel se sidis tie gastoj; ĉampanaj glasoj de ŝlifita kristalo; sed oni ne parolis. Nun estis aŭdataj novaj sonoj, kiel kiam oni savas velojn, kalandras vestaĵojn, aŭ simile.

La orkestrestro devis eliri por rigardi, metis sian animon en la manon de la tutpotenculo kaj eliris.

Unue li vidis la kombjaketon de Lovisa malaperi en la kuireja pordo; vidis la rulkurtenojn ankaŭ suprenmetitajn; vidis la manĝotablon plenan de floroj en glasoj; ho, same

plena kiel iam dum la geedziĝa vespero, kiam li venis hejmen kun sia edzino.

Kaj vidu nun: la suno, la suno brilis tuj en lian vizaĝon, super bluaj golfoj kaj arbaroj malproksime; la suno brilis en la salono kaj faris ĉiujn ŝercojn. Kaj estis lia naskiĝa tago; kaj li benis la sunon kiu brilis tiel frue matene kaj ŝercis kun la dormeganto. Kaj li benis la memoron de ŝi, kiun li nomis la sunon de sia vivo. Ne estis iu nova nomo, sed li ne povis inventi pli bonan, kaj ĝi estis sufiĉe bona.

Kaj la rozo staris sur la altaro de la hejmo kaj estis tute freŝa, same freŝa kiel estis ŝi antaŭ ol ŝi laciĝis pri la trenajo. Laca! Jes, ŝi ne estis unu el la fortaj; kaj la vivo estis tro akra al ŝi kun ĉiuj siaj puŝoj! Li ankoraŭ memoris kiam ŝi gladis aŭ purigis, kiel ŝi falis al la sofo kaj plendis: mi estas tiel laca! – Povrulino, ŝi ne estis hejme ĉi tie, nur gasto, kaj ŝi forvojaĝis.

Kaj ŝi malhavis sunon, diris la doktoro, sed tiufoje ili ne povis pagi vojaĝon al la suno, ĉar sunloĝejoj kostas multe.

Sed nun li havis sunon sen scii tion, kaj li staris meze en la suno, sed estis tro malfrue. La somermezo pasis, kaj la suno denove foriros; estos for dum unu jaro kaj revenos. Ĉio estas tiel strange!

La malfacilaĵoj de la piloto

La piloto kuŝis ekster la lasta lumturo. La vintra suno antaŭlonge subeniris kaj la ondoj estis altaj, vere maraj. Tiam, la prua ŝipano signalis: velanta al la vento!

En la maro videblis brigo kiu brasis reen, levis buspritflagon; do li volis iri en la havenon.

"Atentu!" diris la majstra piloto ĉe la direktilo. "Ĝin oni malfacile prenos inter tiaj ondoj; sed vi, Viktor, ni tuŝas lin je flanko senventa, kaj vi povas ĵeti vin en la rigon kie vi povas... Nun ni turnas nin! – Prete!"

La kutro bone turnis sin kaj iris al la brigo, kiu kuŝis senmove.

"Stranga ulo, kiu ne brasis plene! .. Ĉu vi vidas lumon en la ŝipo? – Ne. – Kaj neniun lanterno en la pru-pinto. – Plene! – Atentu Viktor."

La kutro venis plene; Viktor staris ĉe la apogrelo senventa; kaj kiam granda ondo levis la boaton venontfoje, Viktor sidis supre en la vanto de la brigo, dum la kutro daŭre iris, turnis sin kaj iris al la enira lumturo.

Viktor sidis duonvoje al la trabo kaj elspiris antaŭ ol li denove iris suben al la ferdeko. Kiam li venis suben li tuj iris al la direktilo, kie ja estis lia loko, sed ĉu oni povas imagi lian timon, kiam li

ne trovis iun ĉe la direktilo? Li kriis ha lo, sed li ne ricevis respondon.

"Ili certe sidas kaj drinkas tie ene," li pensis kaj iris al la kajuta fenestro. Ne, tie estis neniu! Li iris antaŭen, al la kuirejo kaj ŝipanejo, sed ankaŭ tie neniu videblis. Tiam li komprenis ke la ŝipo estis forlasita, kredis ke ĝi likis kaj nun sinkis.

Li nun unue okulserĉis la pilotan kutron, sed ĝi malaperis en la mallumo.

Direkti la ŝipon surtere ne eblis, ĉar mallevi brasojn, ŝnuregojn kaj bulenojn, kaj samtempe stari ĉe la direktilo, pri tio oni ne povis pensi.

Ĉi tie estis nenio farebla, nur lasi la ŝipon drivi, eĉ maren.

Li ne iĝis gaja, sed piloto estas preta al ĉio; kaj certe pasos iu velanto, se li nur havos lumon por povi signali. Tial li iris al la kuirejo por serĉi alumetojn kaj lanternon. Kvankam la ondoj estis tre altaj, li ne rimarkis ke la ŝipo moviĝis, kio surprizis lin. Sed eĉ pli li estis surprizata, kiam li venis antaŭ la grandmasto, kaj vidis ke li iris sur pargeto kun longa irtapiŝo, kiu havis blankajn kaj bluajn kvadratojn. Li iris kaj iris, sed la tapiŝo neniam finiĝis, kaj kuirejon li ne plu vidis. Ja estis terure, sed samtempe amuze, ĉar nove.

La tapiŝo ne finiĝis kiam li atingis la eniron al pasejo kun vendejoj lumigitaj. Dekstre estis personpesilo kaj aŭtomato. Sen pensi, li ekstaris sur la pesilo kaj enmetis la moneron. Ĉar li sciis

ke li pezis okdek kilogramojn, li devis rideti kiam la montrilo indikis nur ok kilogramojn. Aŭ la pesilo eraris, aŭ mi venis al planedo dekfoje tiel granda aŭ malgranda kiel la tero, li pensis, ĉar li ĉeestis la lernejon de navigado kaj studis astronomion.

Nun li vidos kio estas en la aŭtomato!

Kiam la monero falis, malfermiĝis klapo kaj el ĝi, letero estis metata en lia mano. Ĉirkaŭ ĝi estis blanka koverto, kun granda, ruĝa sigelvakso; sed la sigelvakson li ne povis legi, kaj tio ne gravis, ĉar li ne sciis de kiu ĝi venis. Li tamen malfermis la koverton kaj legis... unue la subskribon, kiel kutime. Tie staris... jes, tion ni scios poste. Bone, li legis la leteron trifoje, kaj metis ĝin poste en sia brustpoŝo, kun mieno tre pensema; tre!

Kaj li pluiris en la pasejo, sed nun li konsciencis iris meze de la tapiŝo. Tie estis ĉiuspecaj vendejoj, sed videblis neniu homo, nek malantaŭ la tabloj nek antaŭ ili. Iom irinte, li haltiĝis antaŭ granda fenestro, malantaŭ kio estis tuta ekspozicio de helikoj. La pordo estis malfermita, do li eniris. De planko al tegmento estis bretoj kun ĉiuspecaj helikoj, kolektitaj el la multaj maroj de la tero. Neniu estis tie, sed tabaka fumo kuŝis kiel ringo sur la aero, ŝajne ĵus elspirita de iu kiu amuziĝis blovante ringojn. Viktor estis gaja ulo, metis sian fingron tra la

ringo kaj diris: "Hej! Nun mi estas fianĉo de fraŭlino Tabako!" Tiam li aŭdis strangan sonon kiel de horloĝo, sed tie ne estis horloĝo, anstataŭe li rimarkis ke la sono venis de ŝlosilaro. Unu el la ŝlosiloj ŝajnis esti ĵus metita en la monujo, kaj la aliaj ŝlosiloj pendolis regule kiel pendoloj, kaj tiel estis dum certa tempo. Poste iĝis silente, kaj kiam estis tute silente, oni aŭdis trankvilan susuradon kiel kiam la vento iras tra tekelo, aŭ kiam la vaporo iras tra mallarĝa tubo. Susuris la helikoj; sed ĉar ili estis malsame grandaj, ankaŭ la susuraj tonoj havis malsamajn altecojn, kaj sonis kiel tuta orkestro de susuroj. Viktor, kiu naskiĝis dum ĵaŭdo kaj tial povis kompreni birdojn, akriĝis sian oreton por kompreni kio susuris, kaj post momento li faris tion:

"Mi havas la plej belan nomon," diris unu, "ĉar mia nomo estas *Strombus pespelicanus*."

"Mi estas la plej bela!" diris la purpureo, "kiu nomiĝas *murex* kaj aldone iu strangaĵo."

"Mi kantas plej bele!" diris la tibra heliko, kiu nomiĝas tiel ĉar ŝi aspektas kiel pantero.

"Silenton, silenton, silenton!" diris la ĝardena heliko. "Min oni plej aĉetas, ĉar mi kuŝas sur la florbedoj de la somerdomoj. Ili diras ke mi estas teda, sed ili tamen devas havi min. Sed dum la vintro, mi kuŝas en la lignejo en brasikujo."

"Tio estas terura aro, kiu nur laŭdas sin mem," opiniis Viktor, kaj por distri sin li prenis libron

kiu kuŝis malfermita sur la tablo. Ĉar li havis malfemitajn okulojn, li tuj rimarkis ke ĝi montris la paĝon 240, kaj ke la ĉapitro 51 komenciĝis maldekstraflanke. Super la ĉapitro staris, kiel devizo, strofon de Coleridge; kaj ĝia enhavo trafis lin kiel fulmo. Kun ruĝaj vangoj kaj haltigita spirado li legis... jes, pri tio ni parolos poste, sed ne temis pri helikoj, tiel multe ni povas diri jam nun.

La loko tamen plaĉis al li, kaj li eksidis, tamen ne tro proksima al la kaso, ĉar tie estas danĝere. Kaj li komencis pensi pri ĉiuj tiuj strangaj bestoj kiuj iras en la maro, ili kiel li; varme ne estis sur la marofundo, sed ili ja ŝvitis, kaj kiam ili ŝvitis kalkon, tuj iĝis nova pulovero. Kaj ili turnis sin kiel vermoj; kelkaj turnis sin dekstren, kaj aliaj maldekstren, sed tio estis kompreneble, ĉar ili devis turni sin ien, kaj ne ĉiuj povis esti samaj.

Tiam aŭdeblis voĉo el la ĉambreto tra la verda kurteno:

"Jes, tion ni scias, sed kion ni ne scias estas: ke la heliko de la orelo estas *Helix* kaj ke la ostetoj sur la timpana membrano ekzakte similas al la besto en la *stagnalis* de Linnaeus, ĉar tiel estas skribite en la libro."

Viktor, kiu tuj komprenis ke temis pri telepatiisto, respondis ĝentile sed brutale, kaj sen montri iun surprizon, tra la kurteno ankaŭ li:

"Tion ni scias, sed *kial* ni havas Helix en la orelo, tion ne scias la libro, same malmulte kiel la helikovendisto povas vidi..."

"Mi ne estas helikovendisto," blekis la nevideblulo el la ĉambro.

"Kio vi do estas?" reblekis Viktor.

"Mi estas... trolo!"

Samtempe malfermiĝis la kurtenoj, kaj kapo montriĝis, tiel terura ke ĉiu krom Viktor ekfuĝis. Sed li, kiu sciis kiel trakti trolojn, unue rigardis la ruĝe lumantan pipkapon, ĉar tiel la trolo aspektis, kie ĝi staris kaj blovis ringojn en la kurten-truo. Kiam fumringo venis proksime, Viktor metis ĝin sur sia fingro kaj reĵetis ĝin.

"Vi ja povas ĵeti ringojn," la trolo diris mokeme.

"Jes, iom," Viktor respondis.

"Kaj vi ne timas!"

"Maristo ne faru, ĉar tiam neniu knabino ŝatas lin."

"Aŭdu, vi kiu ne timas, iru pli profunden en la pasejon, kaj ni vidos ĉu vi ne timos."

Viktor, kiu havis sufiĉe da helikoj, uzis la okazon foriri sen ŝajni fuĝi, kaj iris el la vendejo, sed regrese, ĉar li sciis ke oni neniam turnu tien la dorson, ĉar ĝi estas pli rompiĝema ol la brusto iam povas iĝi.

Kaj li denove komencis iri, laŭ la blua kaj blanka tapiŝo. La pasejo ne estis rekta, sed kurba,

kaj oni neniam vidis ĝian finon; kaj ĉiam estis tie novaj vendejoj, sed nenijaj homoj; kaj la vendejposedantoj ne videblis. Sed Viktor, kiu lernis de la sperto, komprenis ke ili restis en la ĉambretoj.

Kiam li venis al parfumvendejo, kiu odoris kiel ĉiuj floroj de la herbejo kaj de la arbaro, li pensis: mi eniros kaj aĉetos botelon de Eau de Cologne al mia fianĉino. Dirite, farite! La vendejo estis sufiĉe simila al la helikovendejo, sed laodoro estis tiel forta ke li ekhavis kapodoloron kaj devis sidiĝi sur seĝo. Precipe estisodoro de amara migdalo kiu kaŭzis susuradon en la oreloj, sed lasis bona gusto resti en la buŝo, kiel de ĉerizo-vino. Viktor, kiu neniam estis sensolva, elpoŝigis sian latunan skatolon kun spegulo, kaj enbuŝigis krudan pinĉon, kio klarigis la cerbon kaj nuligis la kapodoloron. Poste li batis la tablon kaj kriis:

"Ha lo, ĉu estas iu tie?"

Ne venis respondo. Tiam li pensis: mi do iros en la ĉambreton kaj finigos mian vendon. Li metis sian dekstran manon sur la tablon, alkuris kaj post salto estis aliflanke. Poste, li forigis la kurtenojn kaj rigardis en la ĉambreton. Tie li vidis ion, kio tute blindigis lin. Sur longa tablo kun persa tuko staris unue oranĝa arbo kun floroj kaj fruktoj, kaj la brilaj folioj similis al tiuj de la kamelio. En vicoj staris ŝlifitaj kristalglasoj,

plenaj de ĉiuj bone odorantaj floroj de la tero, el la jaskmeno, tra la tuberoso, violo, konvalo kaj rozo, eĉ ĝis la lavendo. Sur unu fino de la tablo, duone kaŝita de la oranĝo, li vidis du malgrandajn manojn sub falditaj robmanikoj labori kun eta distila aparato de arĝento, sed de la virino li ne vidis la vizaĝon, kaj ankaŭ ŝi ne vidis lin. Sed kiam li rimarkis ke ŝia robo estis flava kaj verda, li komprenis ke estis sekvantino, ĉar flava kaj verda estas la raŭpo de la sfinkso-papilio, kiu ankaŭ povas devigi vin rigardi alimaniere. Kio estas malantaŭe ĉe li aspektas kvazaŭ estus antaŭe, kaj tie li havas kornon kiel la unukornulo, tiel ke li timigas siajn malamikojn per la falsa vizaĝo, dum li manĝas per tio kio aspektas kiel la malantaŭo.

Viktor pensis: ĉi tie oni batalos, se vi komencu! Tute vere, se oni volas ke homoj parolu, oni nur silentu.

"Sinjoro, ĉu estas vi kiu serĉas la somerdomon?" demandis la virino kaj aperis.

"Jes, tio estas mi," respondis Viktor por ne esti senresponda, ĉar li neniam pensis pri iu somerdomo al la vintro.

La virino iĝis ĝenplena, sed ŝi estis same bela kiel la peko kaj ĵetis sorĉantan rigardon al la piloto.

"Jes, ne valoras la penon, ke vi provas sorĉi min, ĉar mi estas fianĉo de bona knabino," diris

la piloto kaj rigardis ŝin inter la ringa fingro kaj la longa fingro kiel sorĉistinoj, kiam ili volas kvietigi la juĝiston.

La virino estis juna kaj bela supre, sed malsupre ekde la talio estis io tre maljuna, kvazaŭ ŝi estis kunligita de du partoj.

"Nu, lasu min vidi la lokon," diris la piloto.

"Bonvolu," respondis la virino kaj malfermis pordon en la fono.

Ili eliris, kaj ili estis en kverkaro.

"Nur tra la arbaro, kaj ni estas tie," diris la virino kaj petis la piloton iri unue, ĉar ŝi ja ne volis turni al li la dorson.

"Ja ĉi tie iras la virbovo, mi komprenas," diris la piloto, kiu ĉiam pensis.

"Vi ja ne timas la virbovon?" respondis la virino

"Ni ja rigardu lin," diris la piloto.

Ili iris super montoj kaj radikoj, marĉoj kaj brulkulturejoj, sed Viktor foje devis turni sin kaj vidi ĉu ŝi kuniris, ĉar li ne aŭdis ŝiajn paŝojn; kaj ankaŭ kiam li turnis sin kaj havis ŝin antaŭ si, lia okulo devis serĉi ŝin, ĉar ŝia robo flava kaj verda igis ŝin preskaŭ nevidebla.

Fine ili venis al maldensejo en la arbaro, kaj kiam Viktor staris meze sur la verda tero, la virbovo venis kvazaŭ ĝi starus kaj atendus. Li estis nigra, havis blankan stelon sur la frunto kaj sangon en la okulanguloj.

Ĉar neniu fuĝo eblis, oni devis ataki kaj defendi sin. Viktor ĵetis rigardon al la tero, kaj vidu, tie kuŝis barilfosto finiĝanta per lumpo, ĵus hakita. Ĝin li prenis kaj ekstaris en pozicio.

"Vi aŭ mi!" li komandis. "Unu, du, tri!"

Nun komencigis la danco. La virbovo unue iris malantaŭen kiel vaporŝipo, kaj tra la naztruoj li eligis vaporon, movis la voston kiel helicon; kaj poste plenmaŝine antaŭen.

Susuris en la aero, kaj knalis kiel pafo kiam la fosto trafis la virbonon inter la okuloj. Viktor saltis flanken, sed la virbovo havis sian propran direkton. Tiam la sceno ŝanĝiĝis; Viktor tre timis kiam li vidis la beston kuri al la arbara rando, kie en luma robo lia franĉino rapidis por renkonti sian fianĉon.

Tiam li kriis el la profunda animo: "Supren en arbo, Anna! La virbovo venas!"

Kaj li kuris post la bestaĉo, batis lian malantaŭajn kruojn ĉe la plej maldika loko por frakasi oston, se eble. Kaj per superhomaj fortoj li devigis la giganton sinki al la tero. Anna estis savata kaj la piloto tenis ŝin en siaj brakoj.

"Kien ni nun iru?" li diris. "Ja hejmen?"

Demandi ŝin de kie ŝi venis, pri tio li ne pensis, pro kialoj pri kiuj ni poste scios.

Ili iris manenmane, la padon antaŭen, kaj ili estis feliĉaj pro la neatendita revido. Sed post iom da irado, Viktor subite haltiĝis kaj diris:

"Atendu dum momento, mi devas iri kaj atenti la virbovon, ĉar li tamen suferas."

Tiam ŝanĝiĝis la vizaĝo de Anna, kaj ŝia okulangulo iĝis sanga. Kun sovaĝa, malica esprimo ŝi nur diris: "iru, mi atendas!"

La piloto rigardis ŝin malgaje, ĉar li aŭdis ke ŝi parolis malvere. Sed li sekvis ŝin. Ŝia irado tamen estis tiel malkutima, kaj li iĝis malvarma maldekstre.

Post iom da irado, Viktor denove haltiĝis.

"Donu al mi vian manon," li diris, "ne, la maldekstran."

Tiam li vidis ke la ringo ne estis tie.

"Kie estas la ringo?" li demandis.

"Ĝin mi perdis," ŝi respondis.

"Vi estas mia Anna, sed tamen ne. Iu fremdulo flugis en vin."

Samtempe ŝi rigardis lin elflanke, kaj li vidis ke ne estis rigardo de homo sed la sanga rigardo de la virbovo, kaj li komprenis.

"Iru for, sekvantino!" li diris kaj kraĉis al ŝia vizaĝo.

Kaj vidu! La falsa Anna ŝanĝis formon, ŝia vizaĝo iĝis flavverda kiel galo, eksplodis pro kolero, kaj venontmomente nigra kuniklo forsaltis super la mirtelarbustaĵo kaj malaperis.

Nun li staris tie en la komplika arbaro, sed pro tio li ne perdis la kapon, sed pensis: mi ja daŭre

iros, eĉ se venos iu ajn, kaj legas mian patronian ĝustadirekten, tio longe sufiĉas.

Kaj li pluiris, kaj li ekvidis domon. Li batis la pordon, kaj lin ricevis maljuna virino; li demandis ĉu li povos tie pasigi la nokton. La virino respondis ke tion li povos, sed ŝi povas nenion oferi, ĉar estis nur unu ĉambro en la subtegmento, kaj ĝi estis iom...

"Ĝi povas esti kiel ĝi volas, nun mi devas dormi."

Jes, post kelkaj kompromisoj, li povis sekvi ŝin al la subtegmento kaj en la ĉambron. Tie pendis granda vespejo super la lito, kaj la virino pardonpetis ke estis tie tiaj fremduloj.

"Ne pardonpetu; vespoj similas al homoj, ili estas ĝentilaj ĝis oni kolerigas ilin. Eble vi ankaŭ havas serpentojn?"

"Jes, ni ja havas kelkajn."

"Ne pardonpetu; ili ŝatas la litan varmon, do ni certe iĝos amikoj! Ĉu estas vipuro aŭ kolubro? Mi ja ne tre zorgas pri kio, sed mi preferas la kolubron!"

La virino staris senresponda kiam la piloto komencis ordigi la liton kaj montris fortan intencon dormi en la ĉambro.

Samtempe aŭdeblis ekster la fermita fenestro angora zumado, kaj granda krabro provis enveni.

"Venigi la povrulon!" diris la piloto kaj malfermigis la fenestron.

"Ne, kia ulo! Mortigu lin!" kriis la virino.

"Kial mi faru tion? Li eble havas ĉi tie idojn, kiuj malsatos, kaj mi devos kuŝi kaj aŭdi iliajn kriojn, ne dankon! ... Venu, vespeto!"

"Li mordas!" la virino pludiris.

"Ho ne, li mordas nur malicajn homojn..."

Kaj nun la fenestro malfermiĝis. Venis enen krabro same granda kiel kolomba ovo, kaj zumanta kiel basa kordo li tuj iris al la nido. Kaj silentiĝis.

La virino foriris, kaj la piloto enlitiĝis.

Kiam li la postan matenon venis suben en la domo, li ne trovis la virinon tie; sed sur la sola seĝo sidis nigra kato kaj ronronis; la katoj ja devas ronroni ĉar ili estas tiel maldiligentaj, kaj ion ili faru.

"Foriru, kato," diris la piloto, "ĉar mi sidos."

Kaj li prenis la katon kaj metis ĝin en la kameno. Sed ne estis ordinara kato, ĉar nun li komencis lumi per la dorsaj haroj kaj ekbrulis la ligneroj.

"Se vi povas fari fajron, vi povas ankaŭ pretigi kafon," diris la piloto.

Sed la kato estas tia ke li ne volas tion kion volas alia, kaj nun li komencis sibli kaj kraĉi, kaj la fajro estingiĝis.

En la sama momento, la piloto aŭdis ke oni metis fosilon al la dommuro; kaj kiam li rigardis

eksteren, li ekvidis la virinon, kiu staris ĉe truo kiun ŝi malfermis en la ĝardeno.

"Ho, vi do fosas mian tombon, maljunulino," li diris.

Kaj en la sama momento, la virino envenis. Kiam ŝi ekvidis Viktoron tute sana, ŝi tre surpriziĝis; kaj nun ŝi agnoskis, ke neniu iris vivante el tiu ĉambro, kaj ke ŝi tial fosis lian tombon jam prepare. Sed ĉar ŝi vidis iom malbone, ŝajnis al ŝi ke la piloto ekhavis strangan koltukon.

"Jes, ĉu vi vidis tian koltukon," diris Viktor kaj glitigis la manon sub la mentono.

Tie sidis serpento, kiu faris bonan nodon kun du flavaj makuloj; estis ĝiaj oreloj; kaj la okuloj lumis kiel juveloj.

"Montru al onklino viajn kravatajn pinglojn," diris la piloto.

Kaj kiam li gratis la kapon de la serpento, oni vidis la du kravatajn pinglojn en la buŝo.

Tiam, la virino ĉesis pensi kaj elkriis:

"Mi nun vidas ke vi ricevis mian leteron kaj komprenis ĝin. Vi estas bona homo!"

"Ho, ĉu estis via aŭtomata letero," diris la piloto, kaj prenis la leteron el la brustopoŝo. "Ĝin mi metos en vitro kiam mi venos hejmen."

Ĉu vi scias kio staris en la letero? Staris nur tiel: "Man muss sich nie verbluffen lassen," kio

signifas pli-malpli: "La feliĉo apogas la kuraĝulon."

Anne-Marie, kiu aŭdis sian patrino fin la rakonton tiel, nun demandis:

"Jes, sed kiel la piloto povis iri el la ŝipo al la pasejo; kaj ĉu li poste ne reiris, aŭ ĉu li songis ĉion?"

"Tion vi aŭdos alian fojon, demandemulineto," respondis la patrino.

"Jes, sed ankaŭ estis kelkaj strofoj en libro..."

"Kiuj strofoj? Ho, do tiuj en la helikovendejo... jes, ilin mi forgesis..." diris la patrino. "Sed oni ja ne demandu pri tiaj aferoj; ja estas nur fabelo, kara infano!"

Fotografio kaj filozofio

Iam estis fotografisto. Li multe fotografis, profilojn kaj de antaŭe, formojn partajn kaj tutajn, kaj li povis disvolgi kaj difini, tonigi, orbanon kaj kopii. Ja estis iu! Sed li neniam iĝis kontenta, ĉar li estis filozofo, granda filozofo, kaj inventisto. Ĉar li filozofis ke la mondo estas inversa. Tion li ja povis vidi sur la plako, kiam ĝi kuŝis en la evoluskatolo. Kio estis dekstre ĉe la homo, ĉi tie iĝis maldekstre; kio estis malluma iĝis luma, la ombroj iĝis lumaj lokoj, bluaj iĝis blankaj, kaj arĝentaj butonoj iĝis mallumaj kiel fero. Inverse estis.

Li havis kompanianon, kiu estis ordinara homo, plena de etaj apartaĵoj. Ekzemple li fumis tabakon la tutan tagon; li neniam povis lerni fermi pordon; li metis la tranĉilon en la buŝo anstataŭ la forkon; li iris kun la ĉapelo surkape en la ĉambroj; li purigis al si la ungojn meze en la ateliero; kaj vespere li havu tri glasojn da biero. Li estis plena de malĝustaĵoj.

La filozofo, kiu aliflanke estis senmanka, malŝatis sian neperfektan fraton, kaj li volis disiĝi de li, sed li ne povis, ĉar iliaj negocoj kunigis ilin; kaj ĉar ili devis labori kune, la senvolaj sentoj de la filozofo komencis ŝanĝiĝi al senrezerva malamo. Estis terure!

Kaj kiam iĝos printempo, oni luos somerdomon; la kompaniano estis sendata por havi tian. Kaj li havis ĝin. Poste, ili forvojaĝis dum sabata vespero sur la vaporŝipo. La filozofo sidis sur la supra ferdeko dum la tuta vojaĝo kaj trinkis punĉon. Li estis tre dika, kaj lin suferigis pluraj malsanoj, ekzemple ĉe la hepato; kaj ankaŭ kun la piedoj estis iu misfunkcio, eble reŭmatismo aŭ io simila. Nu ja, kiam ili venis al sia loko, ili surpontiĝis.

"Ĉu estas ĉi tie?" demandis la filozofo.

"Ni devas nur iri iomete," respondis la kompaniano.

Ili iris sur pado kun arboradikoj, kaj ĝi finiĝis ĝuste antaŭ palisaro. Ĝin ili devis superiri. Poste venis pado kun ŝtonoj. La filozofo plendis pri siaj piedoj, sed baldaŭ forgesis la doloron pro nova palisaro, superirenda. Poste, la pado malaperis kiel pro propra volo; oni devis iri sur nudaj montoj kaj tra arbustoj kaj mirtelarbustaĵoj.

Ene de la tria palisaro staris virbovo, kiu ĉasis la filozofon al la kvara palisaro, pro kio li ŝvitis kaj malfermiĝis la poroj. Post la sesa palisaro, videblis la domo. La filozofo eniris, kaj eliris sur la verando.

"Kial estas tiel multaj arboj?" li diris. "Ili malhelpas la vidadon."

"Ho, ili protektu vin kontraŭ la mara vento," respondis la kompaniano.

"Kaj ĉi tie similas al tombejo; ni ja loĝas meze en picearo."

"Estas sanige," diris la kompaniano.

Kaj ili iris por bani sin. Sed ne ekzistis banstrando, filozofie dirite. Estis nur ŝtona marfundo kun ŝlimo. Post la bano, la filozofo trinku glason da akvo el la fonto. Estis rustkolora akvo kun acerba gusto. Ĝi ne taŭgis. Nenio taŭgis. Viandon oni ne povis aĉeti, kaj troveblis nur fiŝoj.

La filozofo iĝis malluma kaj sidiĝis sub kukurbo por plendi. Sed li ja devis resti; kaj la kompaniano reiris al la urbo por fari la negocojn dum la feriado de la kamarado.

Ses semajnoj pasis, antaŭ ol la kompaniano revenis al sia filozofo.

Sur la ponto staris maldika junulo kun ruĝaj vangoj kaj bruna kolo. Estis la filozofo, junigita kaj vivema.

Li saltis super la ses palisaroj kaj mem forĉasis la virbovon.

Kiam ili venis al la verando, diris la kompaniano:

"Vi aspektas sana, kiel estis al vi?"

"Ho jes," diris la filozofo, "tute bone! La palisaroj forigis mian grason; la ŝtonoj masaĝis miajn piedojn; la ŝlimo donis al mi ŝlim-banoj kontraŭ la reŭmatismo; la malgrasaj manĝaĵoj sanigis mian hepaton; la picearo sanigis miajn

pulmojn, kaj ĉu vi povas tion kredi, la bruna fontoakvo enhavis feron, ĝuste tion kion mi bezonis."

"Ho ja, filozofo," diris ka kompaniano; "el la negativa plako oni havas pozitivan bildon, el la ombroj iĝas denova lumajn lokojn. Se vi volus preni tian plakon de mi, kaj vidi, kiujn mankojn mi malhavas, vi ne malamuz min. – Nur pripensu: mi ne drinkas, kaj tial mi faras la negocojn; mi ne ŝtelas; mi neniam parolas malbone pri vi; mi neniam plendas; mi neniam aliigas la blankan al la nigra; mi neniam estas malĝentila al klientoj; mi ellitiĝas frumatene; mi purigas la ungojn por teni la evoluskatolon pura; mi tenas la ĉapelon surkape por ke haroj ne falu al la plako; mi fumas tabakon por purigi la aeron de venenaj vaporoj; mi lasas la pordojn malfermitaj por ne brui en la ateliero; mi trinkas bieron vespere por ne droni en la viskio, kaj mi metas la tranĉilon en la buŝo por ke la forko ne piku min."

"Vi vere estas granda filozofo," diris la fotografisto; "nun ni estu amikoj, kaj ni iros longe."

Duona paperfolio

La lasta movŝarĝo jam iris; la lu-gasto, juna viro kun funebra vualeto surĉapele, iris ankoraŭ unu fojon tra la loĝejo por vidi ĉu li forgesis ion. – Ne, li forgesis nenion, kaj li eksteriris al la vestiblo, firme decidita ne plu pensi pri kio li spertis en ĉi tiu loĝejo. Sed vidu, en la vestiblo, apud la telefono, estis ligita duona paperfolio; kaj sur ĝi estis plene skribite kun pluraj stiloj, kelkaj klare per inko, kelkaj skribaĉataj per krajono aŭ ruĝskribilo. Tie ĝi staris, la tuta bela rakonto, kiu okazis dum la mallonga tempo de du jaroj; ĉio kion li volis forgesi staris tie; peco de homa vivo sur duona paperfolio.

Li forigis la paperon; estis tiel sunflava notpapero, kiu lumas. Li metis ĝin sur la rando de la salona kahelforno, klinis sin super ĝi kaj legis. Unue estis ŝia nomo: Alice, la plej bela nomo kiun li tiam konis, ĉar estis tiu de lia fianĉino. Kaj la numero – 15 11. Aspektis kiel himnonumero en la preĝejo. Poste staris: La banko. Tio estis lia laboro, la sankta laboro, kiu donis la panon, la hejmon kaj la edzinon, la bazon de la ekzisto. Sed tio estis forstrekita! Ĉar la banko fiaskis, sed li estis savita al alia banko, tamen post mallonga tempo de granda maltrankvilo.

Poste tio venis. La florvendejo kaj la fiakristo. Estis la fianĉiĝo, kiam lia poŝo estis plena de mono.

Kaj venis: la meblovendisto, la remburisto; li kreas loĝejon. La rapidekspedejo: ili ekloĝas tie.

La biletvendejo de la opero: 50 50. Ili ĵus geedziĝis, kaj dimanĉe iras al la opero. Iliaj plej bonaj momentoj, kiam ili mem sidas silente, kaj renkontiĝas en beleco kaj harmonio en la fabela lando aliflanke de la kurteno.

Tie sekvas vira nomo, forstrekita. Estis amiko, kiu atingis certan nivelon en la socio, sed kiu ne povis porti la feliĉon, sed falis, senhelpe, kaj devis forvojaĝi longe. Tiel rompema estas!

Ĉi tie ŝajnas ke io nova eniris la vivon de la geedzoj. Tie staras, skribite per virina mano kaj krajono: "La fraŭlino." Kiu fraŭlino? – Jes, tiu kun la granda jako kaj la ĝentile kompatema vizaĝo, kiu venas tiel silente, kaj neniam iras tra la salono, sed tra la koridoro al la dormoĉambro.

Sub ŝia nomo staras Doktoro L.

Por la unua fojo, ĉi tie aperas la nomo de parenco. Legeblas "panjo". Tio estas la bopatrino, kiu diskrete forestis por ne ĝeni la novgeedzojn, sed en la nuna mizero estas vokata, kaj venas ĝoje, ĉar ŝi estas bezonata.

Ĉi tie ekas granda skribaĉo blua kaj ruĝa. La komitatoficejo: la servistino foriris, aŭ nova estas

dungota. La apoteko. Hm! Iĝas mallume! La laktajejo. Ĉi tie oni petas lakton, sen tuberkuloj.

La spicvendejo, la buĉisto ktp. La domo estos prizorgata telefone, ĉar la prizorgantino ne estas surloke. Ne. Ĉar ŝi kuŝas enlite.

Kio poste sekvis, tion *li* ne povis legi, ĉar iĝis mallume antaŭ liaj okuloj, kiel devas esti por dronanto surmare, kiam li devas rigardi tra sala akvo. Sed tie staris: La enteriga entrepreno. Tio ja diras sufiĉe! – Granda kaj malgranda, komprenite, ĉerko. Kaj parenteze estis skribite: de polvo.

Poste, nenio plu estis skribita! Per polvo finiĝis; kaj tiel estas.

Sed li prenis la sunpaperon, kisis ĝin kaj metis ĝin en sia brustopoŝo.

Dum du minutoj, li travivis du jarojn de sia vivo.

Li ne klinis sin kiam li eliris; male, li portis sian kapon alte, kiel feliĉa kaj fiera homo, ĉar li sentis ke li tamen posedis la plej belan. Kiel multaj povruloj ne faris tion!

La triumfanto kaj la ŝercanto

Estis tiu printempa vespero en 1880, kiun ni svedoj neniam forgesos, ĉar ni festas ĝin ĉiujare, kaj estis sur Blockhusudden dum tiu neforgesebla vespero. Tie staris maljuna paro, kamparanoj, simplaj homoj, kiuj kune iris la plej grandan parton de la malfacila vivo. Ili vidis laŭ la velvojo kiu estis ombrata sub la larmantaj steloj, kaj ili rigardis viron kiu en la mallumo laboris pri io nekonata ekstere sur la ponto. Longtempe ili staris, tre longtempe; foje vidante eksteren laŭ la malluma velvojo, foje rigardante la grandan lumon el la urbo.

Finfine ili vidis lanternon sur la golfo, du lanternojn, multajn lanternojn. Tiam, la gemaljunuloj premis la manojn unu de la alia, kaj silente, sub la steloj, ili dankis la dion kiu redonis al ili ilian filon, unu el tiuj kiuj iris ĉirkaŭ Azio, kaj kiu dum tuta jaro estis priplorata kiel morta.

Li ja ne estis la plej grava, sed li partoprenis; kaj nun li manĝos ĉe la reĝo, ricevos ordenojn kaj titolon kiu ankaŭ povis doni panon, kiam la parlamento jam voĉdonis por nacia premio de vera mono.

La lanternoj iĝis pli grandaj kaj venis pli proksimen; eta vaporŝipo tiris grandan, malluman barkon, kiu aspektis tiel simpla elproksime, kiel multaj aliaj grandaj fareblaĵoj.

Sed nun oni vidis ke la viro sur la ponto, ĉe la stranga aparato, lumigis alumeton.

"Kio povas esti?" diris la maljunulo. "Aspektas kiel grandaj, grandaj stearinkandeloj."

Kaj ili iris pli proksimen por rigardi.

"Kaj aspektas kiel retsekigilo," diris la maljunulino, kiu venis de la marbordo.

Raĉ! Iĉ-ĉ! Si-si-si-si! sonis. Kaj la maljunuloj staris inter fajroj kaj flamoj.

Supren al la steloj de la ĉielo nun flugis tutaj fajrofaskoj, kiuj plej supre lumigis novajn stelojn, kaj se astronomiisto vidus ilin el observatorio, li kredis ke venis novaj tiaj sur la ĉiela volbo.

Vere venis novaĵoj, sur la ĉielo kaj sur la tero, kun tiu jaro 1880, ĉar venis novaj pensoj en novaj sensoj, kaj nova lumo kaj novaj eltrovaĵoj. Trudherboj ja ankaŭ venis kun la nova tritiko, sed trudherboj staru tie, donu malsekon kaj ombron, por dum la rikolto esti disigita de la tritiko. Sed *kun* ĝi estu, ĉar tio *apartenas*, kiel la ŝeloj al la grajnoj.

Ĉiuokaze estis vera raketa kesto, kaj kiam la fumo estis dispelita – ĉar la fumo *apartenas* al la fajro – la pompo finiĝis.

"Ja estus amuze esti en la urbo ĉivespere!" diris la maljunulino.

"Ho ne!" diris la maljunulo. "Ni nur ĝenus, kaj malriĉuloj, kiuj trapremas sin, tiel facile estas rigardataj kiel fieraĉaj. La knabon ni ja renkontos

morgaŭ, kiam li liberiĝos de la fianĉino, kiu estas pli proksima al li ol ni."

Tio ja estis saĝe dirite de la maljunulo, kaj la maljunuloj estu saĝaj, ĉar kiuj aliaj estu?

Kaj ili iris al la urbo.

Nun ni vidu kiel estis por la filo! ... Li estis marmezuristo enŝipe, kaj li mezuris la profundecon de la maro, la altecon de la lando kaj la ŝajnan movon de la ĉielo; li povis diri kioma horo estis, se li nur vidis la sunon, kaj li sciis kiel longe ili vojaĝis, kiam li rigardis le stelojn. Estis granda homo, kaj li kredis ke li zorgis pri kaj ĉielo kaj tero, kaj li mezuris la tempon kaj reguligis la horloĝon de la eterneco. Kiam li nun estis gasto en la domo de la reĝo kaj ekhavis stelon sur la jako, li ja sentis ke li valoris iom pli ol la aliaj; li eble ne iĝis fiera rilate al siaj malriĉaj gepatroj aŭ sia fianĉino; sed ili ja pensis tiel, kvankam ili diris nenion. Kaj eble li estis iom strikta, ĉar tiel li estis dotita.

Nu! Nun la grandaj festenoj en la ĉefurbo pasis, kaj ankaŭ la studenta urbo volis honorigi la hejmen venantajn heroojn. Do ili vojaĝis tien.

La studentoj ja estas aparta popolo, kiu nur legas en libroj ĉe doktoro ĉionscia, kaj tial ili kredas ke ili scias pli ol aliaj. Kaj ili estas junaj kaj tial senpensaj kaj kruelaj.

Kiam nun la maljunaj doktoroj dum la tagmanĝo parolis saĝe kaj respekteme honore al la maristoj, la studentoj posttagmeze faros festenan marŝon

La marmezuristo sidis sur balkono kun sia fianĉino apud la aliaj granduloj; oni sonigis la preĝajn sonorilojn, pafis kun la kanonoj, ludis per trumpetoj kaj tamburoj, levis flagojn kaj mansvingis. Kaj venis la trajno.

Unue oni ja vidis la ŝipoh, kun ŝipanoj kaj ĉio; kaj venis rosmaroj kaj polusaj ursoj, kiuj apartenis tie; kaj poste studentoj maskitaj al la herooj. La Grandulo mem estis tie kun sia pelto kaj siaj okulvitroj. Ne estis tute respekteme, sed ja estis diskutinde bildigi la honoron tiumaniere, sed nu ja! Bonintence ja estis. Kaj venis tiu, kaj venis tiu, kaj en ĉiuj roloj estis maskitaj studentoj.

Laste venis la marmezuristo. Li certe ne estis bela viro, sed viro ne bezonas esti bela, se li nur estas bona marmezuristo aŭ io alia bona. Sed kiel ili desegnis lin! De vera malbelulo kaj ploranto ili kreis lian anstataŭanton. Tio ja taŭgis; sed la naturo donis al li unu brakon tro mallongan, kaj ankaŭ tion ili desegnis. Kaj tio estis malbone farite, ĉar pri kriplaĵo oni ne kulpas.

Sed kiam la ŝercanto, kiu ludis la rolon de la marmezuristo, venis al la balkono, li diris ion en skania dialekto por ridindegi la marmezuriston,

ĉar li estis skaniano. Kaj tio estis stulte farite, ĉar ĉiu parolas la dialekton kiun li lernis de sia patrino, kaj tio estu honorigata.

Ke ĉiuj ridis ja estis nur pro ĝentileco, ĉar oni estis distrata senpage, sed ke la koro de la fianĉino estis vundata, tio estis enorde, ĉar ŝi ne volis vidi sian estontan edzon ridindigata. La marmezuristo iĝis malluma kaj muta interne. Ĉiuj ĝojoj de la festeno estis for por li. Sed li ne povis montri tion, ĉar tiam oni kredus lin stulta kaj nekapabla kompreni ŝercojn. Sed tiam venis la plej aĉa! La ŝercanto dancis kaj faris simiaĵon kiu estus rebuso pri la nomo de la marmezuristo, kaj familia nomo kiun li heredis el sia patro kaj la persona nomo kiun li ricevis dum la bapto el sia patrino, kaj ĝi estis al li preskaŭ sankta, kaj li neniam volis ŝanĝi ĝin, kvankam ĝi estis iom pompa.

Tiam li volis ekstari kaj foriri, sed la fianĉino devigis lin resti, kaj li daŭre sidis.

Kiam la spektaklo finis kaj ĉiuj sur la balkono ekstaris, la grandulo iris al la fianĉino de la marmezuristo, ĝentile metis manon sur ŝia ŝultro, kaj diris kun sia bona rideto:

"Ĉilande oni havas strangan manieron honorigi siajn grandulojn! Sed tion oni toleru!"

Vespere estis nova festeno, dum kiu la marmezuristo same ĉeestis; sed lia amuzo estis for, kaj li sentis sin tiel malgranda, ĉar li estis tiel

proridata; li ja estis pli malgranda ol la ŝercanto, kiu sukcesis kiel amuziganto; kaj tial li estis malgaja, maltrankvila pri la estonteco, dubanta pri si mem. Kaj kien ajn li iris en la granda ĝardeno, li vidis sian karikaturon en la ŝercanto, kiu estis ĉie. Kaj li vidis siajn mankojn pligrandigitaj, precipe sian fierecon, sian parolemon imitata; kaj plej aĉe de ĉio estis, ke liaj sekretaj pensoj kaj ŝatoj estis malkaŝataj.

Dum tri malagrablaj horoj, li trarigardis la libron de sia konscienco; kaj kion neniu homo kuraĝis diri al li, tion diris la ŝercanto. Ja estas bone koni sin mem; Sokrato diras eĉ ke tio estas la plej bona; kaj je la fino de la vespero, la marmezuristo venkis sin mem, konfesis siajn malfortaĵojn al si mem kaj decidis ŝanĝiĝi.

Tiam li pasis grupon kaj aŭdis voĉon malantaŭ heĝo.

"Strange kiel la marmezuristo pliboniĝis! Li ja estas tute deca homo."

Tio estis bone al lia koro. Sed kio plej gajigis lin estis vorto de lia fianĉino.

"Vi estas tiel ĝentila ĉivespere, kaj tial vi estas tiel bela!"

Li bela? Tio ja estis miraklo, kaj tiaj ja ne okazas nuntempe, sed li devis kredi tion, ĉar li sciis ke li estis malbela.

Finfine, la grandulo sonigis la vinpunĉon kaj faris prelegon, kiu komenciĝis tiel:

"Kiam la romia venkanto faris sian triumfmarŝon, ĉiam sklavo staris malantaŭ li en la vagono, kaj kriis al li dum lin honoris la senato kaj la popolo: 'Memoru ke vi estas nur homo!'" Kaj apud la kvar ĉevaloj de la venkanto iris ŝercanto, kiu malpligrandigis la valoron de la triumfo per siaj mallaŭdoj, kaj la karakteron de la triumfanto per siaj mallaŭdaj kantoj. Tio estis malnova, bona kutimo, ĉar nenio estas tiel danĝera al la homo kiel kredi sin esti dio, kaj nenio estas tiel malagrabra al la dioj kiel fiereco de homoj! – Miaj junaj amikoj; la ago kion faris ni hejmenvenintoj eble estis trotaksata; la ebrio de la venko ja iris al niaj kapoj, kaj tial estis bone hodiaŭ vidi ŝerĉojn; ne ĉar mi envias la ŝercanton pro lia rolo, aŭ volas kredi je liaj belaj intencoj, tute ne, sed mi tamen dankas vin pro via iom stranga maniero honorigi nin. Ĝi instruos min, ke mi devas venki ankoraŭ ion, kaj ĝi ĉiam memorigos al mi, kiam mi estas tentata diiĝi, ke mi estas nur homo!"

"Bone!" kriis la marmezuristo.

Kaj la festeno daŭris en honesta ĝojo, ne malhelpata eĉ de la ŝercanto, kiu honteme foriris kaj malaperis.

Estis la marmezuristo kaj la grandulo! Nun ni vidu kio okazis al la ŝercanto!

La ŝercanto, kiu staris ĉe la tablo dum la parolo de la grandulo, ricevis rigardon de la

marmezuristo, tian rigardon kiu kiel eta fajrosago povas bruligi grandan fortikaĵon. Kaj la ŝercanto estis freneza, kvazaŭ brulis liaj vestaĵoj, kaj li iris en la nokton. Li ne estis ĝentila homo. Ankaŭ ŝercantoj kaj ekzekutistoj ja estas homoj, sed ne la plej bonaj. Multajn mankojn kaj malfacilaĵojn li ankaŭ havis, kiel ni ĉiuj, sed ilin li kapablis kaŝi. Nun okazis io stranga. Ĉar li la tutan tagon imitis la marmezuriston, kaj sub la influo de la ebrio, li tiel eniris sian rolon, ke li ne povis denove eliĝi; kaj kiam li montris la mankojn kaj malfortaĵojn de la marmezuristo, tiuj iel eniris lin; kaj la nomita rigardo de la marmezuristo puŝis ilin en la profundon de lia animo, kiel la stako puŝas la pulvon. Lin ŝargis la malmezuristo, kaj tial li komencis kribri kaj parolegi kiam li venis al la strato. Sed ĉifoje li malsukcesis, ĉar venis policano kaj petis lin esti silenta. La ŝercanto respondis per io amuza, kun la skania dialekto de la marmezuristo. Ĉu oni povas imagi! La policano, kiu hazarde estis skaniano, sentis sin insultata kaj metis la serĉanton en la malliberejo. Nun estas same malfacile por ŝercantoj kompreni ion seriozan kiel por policistoj kompreni ŝercojn, kaj tial la ŝercisto forte kontraŭstaris la agon, kaj tial montriĝis la vergo, kaj rapp! rapp! rapp!

Kaj oni liberigis lin!

Nun oni ja pensas ke povis sufiĉi la puno, sed ne!

La ŝercanto tute ne sentis sin pli bona pro la puno; eĉ pli amara, li iris al milito kiel sia indiano, por vidi al kiu li povus venĝi sin.

La hazardo aŭ io alia gvidis liajn paŝojn al Tullgatan kaj en kamparanan kvartalon. Ĉirkaŭ tablo sur la korto sidis kamparanoj kaj muelistoj, kaj drinkis al la grandulo ĉe lanterno. Kiam ili ekvidis la ŝercanton, ili kredis ke li estis la marmezuristo, kaj ili iĝis tre gajaj, kiam li volis esti tiel afabla ke li trinkos glason kun ili.

Nun la fiero animo de la marmezuristo flugis en la pulvoĉambro de la ŝercanto, kaj li ekbrulis. Li parolis per grandaj vortoj pri siaj agoj; kiel estis li, kiu gvidis la ekspedicion; ĉar se li ne mezurus la profundojn de la maro, ili surfundiĝus; kaj se li ne legus la stelojn, ili ne venus hejmen.

Aŭdiĝis knalo. La ŝercanto ricevis ovon meze inter la okuloj.

Kaj la muelisto diris tiel:

"La marmezuristo fanfaronas; tion ni jam sciis, ĉar la li skribis en la gazeto ke la grandulo estas blufa!"

Nun la alia malforteco de la marmezuristo flugis en la ŝercanton, kaj li diris malvere:

"La grandulo *estas* blufa!"

Tio estis tro, kaj la kamparanoj ne kredis tion. Ili leviĝis, kaj la ŝercanto estis ligita per bova rimeno al plena farunsako. Per tre pura tritika faruno oni ŝminkis lian vizaĝon, per fajro el la

lanterno oni desegnis lin. Kaj dumtempe, muelista servisto kudris lin al la sako per pinglo kaj ŝnureto.

Sed ne ankoraŭ finiĝis. Kun la lanterno unue, la kamparanaro tiris la veturilon, la farunan sakon kaj la ŝercanton laŭ la strato al la granda placo.

Tie oni montris la ŝercanton al la popolo, kiu ridis. Kaj tion li meritis!

Kiam li estis liberigita, li iris apuden kaj sidiĝis sur ŝtuparo por plori. La granda viro ploris. Li preskaŭ estis kompatinda.

Kiam la ligna hirundo venis en la kapran pomarbon

Se oni staras ĉe la haveno, kie kuŝas la vaporŝipoj, kaj rigardas al la lago, tiam oni vidas maldekstre monton kovritan de verda junarbaro, kaj malantaŭ ĝi estas granda domo, formita kiel araneo. Ĉar en la mezo estas rondaĵo, el kiu ok aloj eliras kiel la ok kruroj el la ronda korpo de la araneo. Kiu eniras tiun domon, tiu ne eliras kiam li volas; kaj kelkaj restas tie dum la tuta vivo. Estas la malliberejo.

Dum la tempo de Oskaro 1, la monto ne estis verda. Ĝi male estis griza kaj malvarma, ĉar tie kreskis nenio, nek muskoj nek trikoloretoj, kiuj tamen prosperas sur nudaj rokplatoj. Tie estis nur granito, kaj grizaj homoj kiuj aspektis ŝtonigitaj, hakis ŝtonon, eksplodigis ŝtonon kaj portis ŝtonojn. En tiu ŝtonepoka popolo estis iu kiu aspektis pli ŝtonigita ol la aliaj. Li estis junulo, kiam li dum la tempo de Oskaro 1 estis enŝlosata en tiu malliberejo, ĉar li mortigis homon.

Tutviva malliberulo li estis, kaj en liaj grizaj vestaĵoj estis kudritaj la literoj L. F.

Vintre kaj somere li iris tie sur la monto kaj hakis ŝtonon. Dum la vintro li vidis la vaporŝipan havenon tute malplena; la duonronda ponto kun siaj palisoj malfermis la buŝon kiel dentaro, kaj nun li povis vidi la lignejon, la rajdejon kaj la du

grandegajn tiliojn senfoliajn. Foje glitboato venis trans la insuleto, foje kelkaj sketantaj knaboj. Krome estis tie tute silente.

Kiam la somero ekis, iĝis pli gaje. Tiam laŭ la havenbordo kuŝis belaj ŝipoj, ĵus kolorigitaj kaj kun flagoj. Tiam estis verdaj la tilioj, sub kiuj li sidis kiel infano, kiam li atendis sian patron, kiu estis maŝinisto en unu de la plej belaj vaporŝipoj.

Nun li dum multaj jaroj ne aŭdis venton blovi en arboj, ĉar ja kreskis nenio sur lia roko, sed en lia memoro vivis tiu susurado en la tilioj de Riddarholmen kiel la sola afero kiun li sopiris.

Nun dum somera tago venis vaporŝipo trans la insuleto, tiam li aŭdis ondojn, eble ladinstrumentan muzikon; li vidis gajajn vizaĝojn, kiuj mallumiĝis kiam ili rimarkis la grizajn ŝtonvirojn en la monto.

Sed tiam li malbenis, super ĉielo kaj tero, sian faton kaj la kruelecon de la homoj. Tiel li malbenis dum jaroj, kaj liaj kamaradoj kaj li malbenis kaj suferigis unu la alian tage kaj nokte; ĉar la krimo disigas, sed la malfeliĉo kunigas la suferantojn.

Komence la vivo estis nenecese kruela, kaj la gardistoj batis la malliberulojn kaprice, senindulge.

Sed iun tagon okazis ŝanĝo: la manĝo iĝis pli bona, la traktado pli milda, kaj ĉiu malliberulo povis dormi en propra ĉambro. Ja la reĝo mem

iom mildigis la ĉenojn de la malliberuloj; sed ĉar la senespero ŝtonigis la korojn de tiuj malfeliĉuloj, ili ne povis senti ion similan al dankemo, sed ili daŭre malbenis; kaj nun ili trovis ke estis pli amuze dormi en la sama ĉambro, ĉar tiam oni povis paroli dumnokte. Kaj ili plendis pri la manĝo, pri la vestaĵoj, pri la gardado, ĝuste kiel antaŭe.

Unu tagon oni sonigis ĉiujn sonorilojn de la urbo, precipe tiun de Riddarholmen. Reĝo Oskaro estas morta, kaj la malliberuloj havis senlaboran tagon. Ĉar ili nun povis paroli unu kun la alia, ili parolis pri fuĝprovoj, kiel ili mortbatos la gardiston, kaj ili parolis ankaŭ pri la mortinto, la reĝo; kaj fie ili parolis pri la reĝo.

"Li liberigus nin, se li estus ĝusta," diris unu malliberulo.

"Aŭ li malliberigus ĉiujn krimantojn liberajn."

"Tiam li devus mem esti mallibereja direktoro, ĉar la tuta nacio koleriĝus."

Nun estas tiel pri malliberuloj, ke laŭ ili ĉiuj homoj estas krimuloj, kaj ke ili mem estis malliberigitaj nur ĉar ili havis malbonan ŝancon.

Tamen estis varmega somertago, kiam la ŝtonulo ĉirkaŭiris sur la lagobordo kaj aŭdis la sonojn por Oskaro la Milda. Li sub la lagobordaj ŝtonoj serĉis ĉotojn kaj dornfiŝojn; sed neniu estis tie; kaj fore en la akvo vidiĝis nek plotoj nek alburnoj; do montriĝis neniu movo kaj neniu

ŝterno. Tiam li sentis ke la malbeno kuŝis sur la loko, al kiu nek la fiŝoj nek la birdoj volis proksimiĝi. Kaj li denove pensis pri sia fato. Li perdis sian nomon, personan kaj familian, kaj havis la numeron 65. Nomo skribita per ciferoj anstataŭ per literoj. Li ne estis registrita, ne pagis imposton; ne konis sian aĝon. Li ne plu estis homo, ne plu viva, sed ankaŭ ne morta. Li estis nenio. Nur io kio moviĝis grize en la monto kaj terure bruligita de la suno, la vestaĵoj, la kapo, kun la mallonge tonditaj haroj, kiuj iam estis bukloj, kombitaj per bona kombilo sabate de la milda mano de patrino. Ĉapon li hodiaŭ ne rajtis porti, ĉar tiam li povus pli facile fuĝi. Kaj kiam la suno pikis lian kapon, li memorigis pri rakonto pri la profeto Jona, kiu ricevis laŭbon de la sinjoro por povi sidi en ĝia ombro.

"Kaj kion li ricevis!" li mokis; ĉar li kredis pri nenio bona, absolute nenio!

Samtempe li vidis en la lagoborda akvo grandan betulbranĉon balanciĝi. Ĝi estis tute verda, kun blanka trunko, kaj povis esti falinta el plezur-iranta vaporŝipo. Li tiris ĝin enlanden, forskuis la akvon kaj prenis ĝin kun si, foren en montofendon, kie li apogis ĝin inter tri ŝtonoj. Kaj sub la betulo li sidiĝis kaj aŭdis kiel la vento malrapide blovis en la folioj, kiuj odoris de la plej bona rezino.

Kiam li longtempe sidis en la malvarmo, li ekdormis.

Kaj li songis:

La tuta monto estis verda arbareto kun dolĉaj arboj kaj odorantaj floroj. Birdoj kantis, abeloj kaj burdoj zumis kaj papilioj flirtis. Sed sola por si mem staris arbo kiun li ne konis; kaj ĝi estis pli bela ol la aliaj, ĉar ĝi havis plurajn trunkojn kiel arbusto; kaj la branĉoj saltis kaj turnis sin bele, kiel sur kroĉetadoj. Kaj sub ĝiaj brilaj folioj sidis eta nigra kaj blanka birdo, kiu similis al hirundo sed ne estis.

Kaj en la songo li ja povis kompreni la birdan kanton, kaj tial li sufiĉe bone sciis kion la birdo kantis. Kaj ĝi kantis: "Ŝlim, ŝlim, ŝlim, tien! Hiv, hiv, hiv, ĉi tien! En ŝlimo, en ŝlimo, en ŝlimo vi mortis! El la ŝlimo, el la ŝlimo, el la ŝlimo vi renaskiĝis!"

Temis pri ŝlimo, pri morto kaj pri renaskiĝo, tion li komprenis.

Sed la songo daŭriĝis. Li staris sur la roko, sola en la brulanta sunlumo, mem brulanta pro soifo kaj malsato.

Ĉiuj kamaradoj forpuŝis lin kaj minacis lian vivon, ĉar li ne volis kunfari brulatencon en la malliberejo. Ili staris amase malantaŭ li kaj ĉasis lin per ŝtonoj al la monto, tiel longe kiel li povis iri. Kaj nun lin malhelpis muro.

Li ne vidis eblecon superiri ĝin; en sia senespero li decidis kuri al la muro kun la kapo antaŭe, kaj tiel doni al si la morton.

Li kuris suben laŭ la monto, kaj vidu, en la sama momento estis malfermata pordo, verda ĝardeno pordo... kaj... nun li vekigis!

Kiam li pripensis sian situacion kaj vidis ke la dolĉa arbareto estis nur la betulbranĉo, li iĝis nekontenta enmense kaj diris al si mem:

"Se almenaŭ estus tilio."

Kaj kiam li aŭskultis, li trovis, ke la betulo kantis tiel malmole; sonis kiel kiam oni sonigas sablon kaj ŝtonetojn; dum la tilio povis ludi la velure molajn koro-tonojn.

La postan tagon, la betulo estis velkinta kaj donis malmulte da ombro.

La tagon post tio, la folioj estis sekaj kiel papereroj kaj klakis kiel dentoj. Kaj fine staris tie en la montofendo granda betulbranĉaro, kiu tiel bone memorigis pri lia infana aĝo.

Tiam li denove pensis pri la laŭbo de la profeto, kaj li malbenis kiam la suno pikis lian kapon.

Nun estis nova reĝo, kaj estis nova rapideco en la regado de la lando. Kaj oni faros novajn irvojojn en la urbo. Tial oni ordonis la malliberulojn al barĝoj por dragi.

Por la unua fojo dum tiel multaj, multaj jaroj li rajtis forlasi sian rokon. Kaj li denove iris sur akvo, vidis tiel multe da novaĵoj en sia naskiĝa urbo; vidis precipe la fervojon kaj la vaporveturilon. Kaj sub la stacio ili dragu.

Kaj ili komencis levi ĉion malpuran sur la lagofundo. Tie venis dronigitaj katoj kaj malnovaj ŝuoj, putrinta graso el la stearinkandelfabrika, kolorfibroj el la kolorigujlo Blua Mano, tan-ŝelo el la tanilo, kaj ĉiu homa mizero, kiun la lavistinoj dum cent jaroj ĵetis el la lavponto.

Kaj venisodoro de sulfuro kaj amoniako tiel neeltenebla, ke nur malliberulo povus elteni ĝin.

Sed kiam la barĝo estis plena, la malliberuloj scivolis kie oni lasu ĉiujn tiujn malpuraĵojn. La respondon ili ricevis, kiam la boatkondukanto venis al ilia propra roko.

Tie oni forĵetis ĉiun ŝlimon al la monto, kie la aero baldaŭ estis infektita. Kaj ili vadis en malpuraĵoj, kaj ili malpurigis siajn vestaĵojn, manojn, vizaĝojn.

"Ĉi tio estas la infero!" diris la malliberuloj.

Dum kelkaj jaroj ili dragis kaj lasis sur la roko, kiu fine malaperis.

La blanka neĝo de la vintro falis dum ĉiu malfrua aŭtuno, tiris la kovrilon kun la blankaj tukoj super ĉio malpura.

Kaj kiam venis la lasta printempo kaj la neĝo fandiĝis, tiam la aĉa odoro estis for kaj la ŝlimo komencis aspekti kiel tero. Dum tiu printempo la dragado estis finigita, kaj nia ŝtonulo nun povis labori en la forĝejo, kaj neniam plu venis al la roko. Sed iam dum la aŭtuno li kaŝiris tien kaj vidis ion strangan.

Herboj kreskis sur la dragaĵoj. Malbelaj, dikaj herboj, jes ja. Pleje tiu kiun oni nomas *Bidens tripartita*, kaj kiu similas al urtiko sed havas brunajn florojn, kio estas malbele, ĉar floroj estu blankaj, flavaj, bluaj aŭ ruĝaj. Kaj tie estis ankaŭ veraj urtikoj kun verdaj floroj, kaj lapo, rumekso, kardoj, kenopodio; ĉiuj la malbelaj, bruligantaj, pikantaj, malbonodorantaj herboj kiujn la homoj ne amas, kaj kiuj sekvas rubejojn, bruligitajn ĝardenojn kaj drugaĵojn.

"Ni purigis la lagon, kaj ni ricevis la malpuraĵojn," diris la malliberulo. "Tiel oni dankas!"

Kaj venis tempo, kiam oni translokigis lin al alia roko, kiu estos fortikaĵo, kaj li denove laboris en ŝtono, ŝtono, ŝtono!

Tie li perdis unu okulon, kaj estis foje batita. Kaj tie li restis tiel longe ke la nova reĝo mortis kaj alia sekvis. Dum la koroniga tago, unu malliberulo estos pro indulgo liberigata. Kaj kiu kondukis plej bone kaj ankaŭ komprenis ke li agis malĝuste, tiu ricevis indulgon. Kaj tiel okazis!

Sed tiam, la aliaj malliberuloj trovis ke oni traktis ilin malĝuste, ĉar en iliaj rondoj oni opiniis ke tiu estas malkuraĝa kiu pentis tion "pri kio li ne kulpis."

Kaj denove, ja jaroj pasis! Nia ŝtonulo nun estis tre maljuna, kaj ĉar li ne havis fortojn por pezaj laboroj, oni rekondukis lin al lia roko, kaj lasis lin kunkudri sakojn.

Iun tagon venis la pastro kaj ekstaris apud la ŝtonulo, kie tiu sidis kaj kudris.

"Nu," diris la pastro, "ĉu vi neniam iros el ĉi tie?"

"Kiel tio okazus?" respondis la ŝtonulo.

"Ho, kiam vi komprenos ke vi agis malĝuste!"

"Se mi vidus homon, kiu agas pli ol ĝuste, mi kredos ke mi estis malĝusta! Sed tio neniam okazos."

"Pli ol ĝuste, tio estas la kompato! Vi baldaŭ spertu ĝin!"

Iun tagon oni ordonis la ŝtonulojn meti vojojn sur la roko, kiun li ne vidis dum eble dudek jaroj.

Denove estis somera tago, estis varme, kaj la vaporŝipoj pasis gaje zumantaj, belaj kiel papilioj.

Kiam li venis al la kabo – tiam li ne plu vidis rokon, sed dolĉan, verdan arbareton, kie la folioj brilis en la vento kiel ondetoj sur la lago. Tie estis altaj, blankaj betuloj kaj tremantaj tremoloj, kaj ĉe la akvo staris alnoj!

Estis kiel en tiu sonĝo. Kaj sub la arboj flustris herboj kaj klinis floroj siajn kapojn, kaj tie flugis burdoj kaj flirtis papilioj. Kaj multspecaj birdoj kantis tie, sed li ne povis kompreni ilian kanton, kaj tial li komprenis ke ne estis sonĝo.

La monto de malbeno nun estis de beno, kaj li ne povis ne pensi pri la profeto kaj la laŭbo.

"Ĉi tio estas indulgo kaj kompto!" diris iu ene de li, voĉo aŭ instigo aŭ kiel oni nomu ĝin.

Kaj kiam vaporŝipo pasis, la vizaĝoj ne mallumikiĝis, sed ili lumiĝis vidante la belan verdaĵon, jes, li kredis ke iu mansvingis kiel oni kutimas, kiam oni pasas somerdomon.

Li iris sur pado sub susurantaj arboj. Tie ja ne estis tilio, sed li ne kuraĝis deziri tilion por ke la betuloj ne iĝu branĉoj; tiel multe li lernis.

Kaj kiam li iris laŭ la folipado, li vidis plej malproksime blankan muron kun verda latpordo. Kaj li aŭdis iun ludi, sed ne orgenon, ĉar estis pli gaje kaj rapide. Super la muro li vidis belan tegmenton de vilao, kaj bluflava flago moviĝis pro la vento.

Kaj super la sama muro li vidis pilkon kun brilaj koloroj leviĝi kaj fali; etaj, malfortaj voĉoj babilis, kaj la bruo de teleroj kaj glasoj diris al li ke oni aranĝis tablon.

Li venis al la pordo kaj vidis... La siringoj floris, kaj sub ili oni aranĝis tablon; tie ludis infanoj, tie oni ludis instrumentojn, tie oni kantis.

"Ĉi tio estas la paradizo!" la voĉo diris al li.

Li longe staris kaj rigardis; tiel longe ke li, la maljunulo, ŝrimpos pro laceco, pro malsato, pro soifo, pro ĉiu mizeroj de la vivo.

Tiam la pordo estis malfermita, kaj eliris eta knabino en lumaj vestaĵoj. Ŝi portis en sia mano pleton de arĝento, kaj sur ĝi staris glason de vino, la plej ruĝa kiun li iam vidis. Kaj la infano iris al la maljunulo, tute direkte, kaj diris:

"Venu, maljunulo, kaj vi ricevos vinon."

La maljunulo akceptis kaj trinkis. Estis vino de riĉuloj, veninta defore el la landoj de la suno; kaj ĝi gustis kiel la dolĉeco de la bona vivo, kiam ĝi estas plej bona.

"Ĉi tio estas kompato!" diris lia propra, rompita voĉo. "Sed vi, infano, ne senscie donus al mi la trinkaĵon, se vi sciis kiu mi estas. Ĉu vi scias kiu mi estas?"

"Jes, vi estas malliberulo, kompreneble!" diris la knabino.

"Tion vi sciis! Kaj tamen... Ĉi tio estas kompato."

Kiam la maljunulo reiris, li ne plu estis el ŝtono, sed io komencis kreski ankaŭ en li.

Kaj kiam li pasis krutaĵon, li vidis arbon kun multaj trunkoj kiel arbusto. Ĝi estis la plej bela de ĉio, kaj estis kapra pomarbo, sed tion la maljunulo ne sciis. En la arbo flugis eta, maltrankvila birdo, nigra kaj blanka kiel hirundo,

kaj la popolo nomas ŝin la ligna hirundo,
kvankam ŝi havas alian nomon. Kaj ŝi sidiĝis plej
ene inter la folioj kaj kantis tiel malgaje sed
milde.

En ŝlimo, en ŝlimo, en ŝlimo vi mortis!

El la ŝlimo, el la ŝlimo, el la ŝlimo vi
renaskiĝis!

Estis ĝuste kiel en la sonĝo; kaj tiam, la
maljunulo komprenis kion la ligna hirundo volis
diri.

La sekretoj de la tabaka budego

Iam estis juna knabino ĉe la opero. Ŝi estis bela, do homoj turnis sin en la strato, kaj ŝi kantis kiel ne multaj.

Tiam venis la orkestrestro kaj komponisto kaj ofertis sian regnon kun sia koro. La regnon ŝi akceptis, sed la koron lasis.

Nun ŝi estis granda, granda kiel neniu! Kaj ŝi iris en pompa aŭto laŭ la strato kaj kapsignis al sia portreto, kiu estis en la fenestroj de ĉiuj librovendistoj.

Ŝi iĝis eĉ pli granda, kaj estis sur poŝtkartoj, sapoj kaj cigarkestoj. Finfine, ŝia portreto pendis en la promenhalo inter tiuj de la mortaj senmortuloj; kaj tiam, ŝi iĝis honeste dirite fierega.

Iun tagon ŝi staris sur ponto ĉe la maro, kie la ondoj estis altaj kaj la fluo forta. La orkestrestro kompreneble staris apude, kaj ankaŭ multaj aliaj junuloj. La belulino ludis per rozo; kaj ĝin ĉiuj viroj volis havi; sed nur tiu havos ĝin kiu povos preni ĝin.

Kaj ŝi ĵetis la rozon longe en la ondojn. La junuloj longe rigardis la floron, sed la orkestrestro tuj saltis en la maron, kiel mevo sur la ondo, kaj baldaŭ havis la floron inter la lipoj.

Tiam oni aplaŭdis sur la ponto, kaj kiu kuŝis en la maro, tiu vidis en ŝia okulo ke ŝi amis lin.

Sed kiam li nun volis iri al la tero, li ne povis moviĝi. Tie estis fluo kun turnakvo, sed tion ne komprenis ŝi sur la ponto, sed ŝi kredis ke li ludis, kaj tial ŝi ridis. Sed li kiu sentis la mortan danĝeron miskomprenis ŝian ridon, kiu ne estis bona, kaj li sentis pikon en sia koro, kaj per tio finiĝis lia amo.

Sed li venis al la tero kun sangantaj manoj, kiujn li ŝiris sur la ponto.

"Vi havu mian manon," diris la belulino.

"Ĝin mi ne volas havi," diris la orkestrestro, turnis la dorson kaj foriris.

Tio estis majestatenco kontraŭ la belulino, kaj tial li devis morti.

Kiel okazis ke la orkestrestro venis el sia loko, tion scias nur teatruloj kiuj komprenas tiajn aferojn. Fikse li sidis, kaj nur post du jaroj oni povis subenskui lin.

Sed li ja falis; kaj kiam ŝi forigis sian bonfaranton, ŝi triumfis, kaj iĝis eĉ pli fierega, tiel ke tio eĉ iĝis videbla. Kaj la publiko vidis sub la ŝminko ke la koro estis malica; tial ŝia kanto ne plu movis ĝin, kaj ĝi ne kredis je ŝiaj larmoj aŭ ridetoj.

Tion ŝi rimarkis kaj iĝis amara. Ŝi ankoraŭ regis la teatron; sufokis ĉiujn kiuj volis iri supren, kaj morthakis ilin en la gazetoj.

La favoron ŝi perdis, sed la potenco gravis al ŝi pli; kaj ĉar ŝi nun estis riĉa, kaj potenca kaj

kontenta, ŝi ĝuis la vivon; kaj kiuj ĝuas, tiuj almenaŭ iĝas maldikaj, male ili facile dikiĝas; kaj ŝi vere komencis iom fari tion. Ŝi komenciĝis malrapide kaj singarde, tiel ke ŝi mem ne rimarkis tion, ĝis estis tro malfrue. Knal! Suben oni iras rapide, kaj ĉi tiu vojaĝo estis kapturpe rapida. Sed la torturo, kiun ŝi donis al si, ne helpis. Ŝi havis la plej bongustan tablon en la urbo, sed ŝi devis malsati, kaj ju pli ŝi malsatis, des pli dika ŝi iĝis.

Post unu jaro, ŝi estis ekster la ludo, kaj ŝia pago malpligrandiĝis. Post du jaroj, ŝi estis duone forgesita kaj anstataŭita per pli junaj. En la tria jaro, ŝi estis maldungita; kaj tiam ŝi luprenis subtegmentan ĉambron.

"Tio estis nenatura dikeco," diris la reĝisoro al la sufloro.

"Ne estas dikeco; estas fierego," diris la sufloro.

Nun ŝi sidis en la subtegmenta ĉambro kaj rigardis suben al granda plantejo. Tie staris ankaŭ tabaka budego, kaj ĝin ŝi ŝatis, ĉar ĝi ne havis fenestrojn, kie homoj povis sidi kaj rigardi ŝin. Kaj tie loĝis paseroj sub la tegolo; sed tie oni neniam pendis tabakon, ĉar tian oni tie ne plantis.

Tiel ŝi sidis dum la tuta somero kaj rigardis sian budegon, scivolis al kio ĝi taŭgis, ĉar la pordoj estis ŝlositaj per grandaj pend-seruroj, kaj

neniu estis vidata irante enen aŭ elen. Ke li kaŝis kelkajn sekretojn, tion ŝi scietis, sed de kiu speco ŝi baldaŭ vidis.

De la iama famo ankoraŭ ekzistis kelkaj eroj, kiujn ŝi tenis kaj per kiuj ŝi vivtenis sin; ili estis ŝiaj brilaj roloj, Carmen kaj Aida, kiujn neniu sekvantino ankoraŭ kantis; kaj en la memoro de la publiko, ankoraŭ vivis ŝia prezento, kiu estis bonega.

Nu ja, iĝis aŭgusto; la lanternoj denove eklumis, kaj la teatroj estos malfermigataj.

La kantistino sidis ĉe sia fenestro kaj subenrigardis al la budeggo, kiu ĵus estis ruĝfarbita kaj ricevis brikan tegmenton.

Tiam viro venis, tretanta la terpomkultivejojn; kaj li portis grandan, rustintan ŝlosilon. Li malfermis la budeggon kaj eniris.

Poste venis du aliaj viroj, kaj ŝi kredis ke ŝi rekonis ilin; kaj ankaŭ ili malaperis en la budeggon.

Nun komencis iĝi interesa.

Post momento la tri viroj elvenis, portantaj ion grandan kaj strangan, kiu similis al litfundoj aŭ interpartaj ekranoj.

Ekster la pordo ili turnis la ekranojn kaj apogis ilin al la budegga muro; kaj tie oni vidis kahelformon, sed ĝi estis pentrita, malbone pentrita. Poste oni vidis pardonon al iu kamparana

domo, eble la kabano de ĉasisto. Poste venis arbaro, fenestro kaj biblioteko.

Estis teatraj dekoracioj. Kaj post momento ŝi rekonis la roz-arbuston en Faŭsto.

Ja estis la dekoraciejo de la opero, kaj ĉe tiu rozarbusto ŝi mem iam kantis "Eta floro vi ja estas".

Doloro sentiĝis en la kompatinda koro, kiam ŝi komprenis ke Faŭsto devis leviĝi, sed estis unu konsolo: ke ŝi ne kantis la ĉefan rolon, kiu ja estas tiu de Margareta.

"Faŭsto, bone! Sed se ili tuŝos Carmen aŭ Aida, tiam mi estas morta!"

Tie ŝi sidis kaj vidis kiel la repertuaro estis ŝanĝita; kaj ŝi sciis, dek kvar tagojn antaŭ la gazetoj, kion la opero prezentos. Ja ĉiam estis io amuza! Ŝi vidis la liberan pafiston esti eltirata kun la lupa abismo kaj ĉio; ŝi vidis la flugantan holandanon kun la ŝipo kaj la maro; Tannhäuser kaj Lohengrin kaj multajn pli.

Sed venis tago, ĉar devis veni la neevitebla. La viroj tiris (unu el ili nomiĝis Lindkvist, ŝi memoris, kaj li prizorgis la blokpadojn); kaj aperis placo en Hispanio. La kuliso staris oblikve, do ŝi ne vere povis vidi kio ĝi estis; sed unu el la viroj malrapide ŝanceligis la kadron, kaj tiel videblis la malantaŭa flanko, kiu ĉiam estas malbela. Kaj tie estis skribite per grandaj, nigraj literoj, kiuj videblis unu post la alia, malrapide

kvazaŭ por turmenti ŝin; tie estis skribite, por ĉiam, klare: C, A, R, M, E, N. Ja estis Carmen!

"Nun mi mortas," diris la kantistino.

Sed ŝi ne mortis, la kompatinda, eĉ ne kiam Aida aperis. Tamen, ŝia nomo estis forstrekita el la memoro de la homoj, el la fenestro de la librovendisto, el la poŝtkartoj; sed fine malaperis, pro nekonata kialo, ŝia portreto el la promenhalo.

Ŝi ne povis kompreni ke la homoj forgesis tiel rapide; estis tute neklarigeble. Sed ŝi funebris sin mem kiel oni funebras mortinton; kaj la kantistino, la honorata, ja estis morta!

Kaj dum iu tago ŝi iris sola sur malplena strato. Tie estis forĵetejo por malpuraĵoj. Ŝi ekstaris sen pensi plu pri io, sed ŝi vidis sufiĉe de la pereemo, ĉar sur la rubejo kuŝis poŝtkarto, kaj sur ĝi estis ŝia bildo kiel Carmen.

Ŝi iris rapide de tie kaj ploris interne. Venis en flankstraton, kie la fenestro de eta librovendisto haltigis ŝin; ŝi ja kutimiĝis ekstarti ĉe tiaj fenestroj kaj vidi ĉu ŝi pendis ekstere. Sed tie ŝi ja ne pendis. Sed pendis afiŝo, sur kiu ŝi kontraŭvole legis la strangan vortojn: "La vizaĝo de la Sinjoro staras super tiuj kiuj agas malbone, tiel ke li forskrapas ilian memoron el la tero."

Tiuj kiuj agas malbone! Ja tiel, ŝia memoro estis forskrapita. Tio klarigis la forgeson de la homoj.

"Sed ĉu malbono ne povas denove iĝi bono? Ĉu mi ne suferis sufiĉe da punoj?" ŝi plendis.

Kaj ŝi iris en la arbaron, kie estis neniuj homoj. Kiam ŝi iris, senespera, frakasita, humila, ŝi vidis alian solan homon stari antaŭ ŝi. Kaj li demandis per la okuloj kaj li kuraĝis saluti.

Estis la orkestresto. Sed liaj okuloj ne riproĉis ŝin, ne esprimis humiligan kompaton, sed ili esprimis admiron, miron kaj amemon.

"Kiel maldika kaj bela vi iĝis, Hanna!" diris lia buŝo.

Ŝi rigardis sin, kaj ŝi trovis ke estis vere. La funebro forbruligis la nenecesan, fieran karnon, kaj ŝi estis pli bela ol antaŭe.

"Kaj same juna estas vi! Pli juna!"

Kaj tio estis la unuaj bonaj vortoj, kiujn ŝi aŭdis dum longaj tempoj; kaj kiam ili venis el li, kiun ŝi traktis tiel malbone, tiam ŝi komprenis kion valoras bona homo, kaj tion ŝi diris.

"Ĉu vi ankoraŭ havas vian voĉon, Hanna?" demandis la orkestrestro, kiu ne eltenis aŭdi ĝentilaĵojn.

"Mi ne scias!" ŝi plorsingultis.

"Venu en la kantoĉambron morgaŭ... Jes, en la opero ĉe mi, kaj ni aŭdos. Mi nome estis redungita tie..."

La kantistino venis, revenis kaj rerevenis.

La publiko pardonis kaj forgesis; forgesis la malbonon; kaj nun, la kantistino denove estis same granda, ja multe pli granda ol antaŭe.

Tio estis edifa rakonto!

La sagao de Sankta Gothardo

Estas sabata vespero en Göschenen en la kantono de Uri, unu el la kvar prakantonoj, la kantono de Wilhelm Tell kaj Walter Fürst. Je la norda flanko de Sankta Gothardo, kie oni parolas ĝermane, kaj kie loĝas trankvilaj, amikemaj homoj, kiuj povas decidi pri siaj propraj aferoj, kie la "sankta arbaro" protektas kontraŭ lavango kaj disfalegoj, tie kuŝas la verda vilaĝo ĉe rivereto, kiu movigas muelilojn kaj enhavas trutojn.

Nun dum la sabata vespero, kiam la vespera sonorilo sonigas *angelus*, nun la vilaĝanoj kuniĝas sub la granda ugland-arbo. Tie venas la poŝtestro, la bajulo kaj eĉ la kolonelo, ĉiuj senjakaj kaj kun falĉiloj surŝultre. El la fojnorikolto de la tago ili venas por lavi la falĉilojn, ĉar ĉi tie oni honoras la laboron, kaj kion oni mem faris estas plej bona. Do ankaŭ la knaboj venis kun falĉiloj, kaj poste la knabinoj kun la laktositeletoj; laste kolektiĝas la hejme naskitaj bovinoj de giganta raso, kie ĉiu bovino estas same granda kiel virbovo. Grasa estas la lando kaj benita; sed la vino ne kreskas tie, ĉe la norda flanko de Gothardo, nek la olivo, nek la silka arbo, nek la abunda maizo. Verdaj herboj kaj oraj grajnoj, la alta ugland-arbo kaj la grasa folibeto, tio estas la rikolto de la lando.

La gastejo La Ora Ĉevalo staras ĉe la fonto, sub krutegaĵo de Sankta Gothardo; kaj tie en la ĝardeno, ĉe unusola longa tablo, ili nun sidas post la laboro de la tago, la lacaj falĉistoj, ĉiuj ĉe la sama tablo, sen ranga ordo: la bajulo, la poŝtestro, la kolonelo, ankaŭ la servistaj knaboj; la fabrikanto, kiu faras pajlajn ĉapelojn, kaj liaj laboristoj; la eta ŝufaristo de la vilaĝo, la lernejestro kaj ĉiuj aliaj.

Ili parolas pri la terfruktoj kaj la melkado; kaj ili kantas kune, kantoj kiuj sonas en simplaj triopaj akordoj kiel la korno kaj la bovinaj sonoriletoj. Ili kantis pri la printempo kaj ĝiaj puraj amuzaĵoj, tiel fidele verda kaj esperplene blue.

Kaj ili trinkas la luman bieron.

Poste la junularo ekstaras por ludi, lukti, kaj salti, ĉar morgaŭ estos pafofesto kun vetludoj, kaj tiam oni devos esti facilmova.

Tial oni frue faris la vespersignalon en la kornoj, tiun vesperon, por ke neniu venu nedorminta kaj dormema al la festoj, kie oni riskos la honoron de la vilaĝo.

La dimanĉo komenciĝis kun sonoriloj kaj suno; feste vestitaj homoj kolektiĝis el proksimaj vilaĝoj, kaj ĉiuj aspektis satdormintaj kaj ĵus vekigintaj. Preskaŭ ĉiuj viroj anstataŭis la falĉilon per la pafilo; la knabinoj kaj la

edziniĝintaj virinoj rigardis ilin atente kaj helpe, ĉar por domo kaj hejmo ili lernis pafi; kaj la majstropafisto sciis ke li rajtos unue danci kun la plej bela.

Nun venis giganta kradĉaro, tirata de kvar kuraĝaj ĉevaloj, vestitaj per rubandoj kaj floroj; kaj la tuta kradĉaro estis unu granda laŭbo en kiu estis benkoj, sed el tie oni aŭdis kantadon, bela kaj alta kantado, pri svisa lando kaj svisa popolo, la plej bela kaj plej kuraĝa popolo.

Poste venis la vico de la infanoj; ili iris po du, manenmane, kiel se ili estus bonaj amikoj, aŭ kiel gefianĉoj.

Kaj kiam la sonoriloj sonis, tiam ili ĉiuj iris al la preĝejo.

Sed post la diservo komenciĝis la festo; kaj ĉe la pafejo, kiu estis klinita al la granda krutegaĵo de Sankta Gothardo, la pafoj baldaŭ knalis.

La filo de la poŝtestro estis la majstropafisto de la vilaĝo, kaj ne estis duboj ke li ricevos la premion. Li pafis sian vicon, kaj kvar el ses pafoj trovis la celon.

Sed tiam oni aŭdis el la altaĵo kriadon kaj krakadon; ŝtonoj kaj gruzo rulis laŭ la krutaĵo, kaj oni vidis la piceojn en la sankta protektarbaro balanciĝi kiel pro ŝtormo. Baldaŭ estis vidata, sur ŝtonbloko kun la pafilo surŝultre kaj svingante la ĉapelon, la sovaĝa ĉamĉasisto Andrea el Airolo,

la itala vilaĝo en la kantono Ticino, aliflanke de la monto.

"Ne iru en la arbaro!" kriis ĉiuj ĉasistoj.

Andrea ne komprenis.

"Ne iru en la sankta arbaro! La monto falos sur nin!" kriis la bajulo.

"Do lasu tion okazi!" respondis Andrea kaj iris plenrapide laŭ la krutaĵo. "Kaj jen mi!"

"Vi venas tro malfrue!" respondis la bajulo.

"Neniam tro malfrue mi venis,," respondis Andrea, kaj iris al la pafejo, metis la pafilon sesfoje al la vango kaj sesfoje trafis.

Nun li estus la venkinto; sed la gildo havis siajn leĝojn, kaj oni ne ŝatis la blankan, sudan popolon el la alia flanko de la monto, kie la vino kreskis kaj la silko estis ŝpinata. Estis malnova malamikeco, kaj la pafo de Andrea ne estis valida.

Sed Andrea iris al la plej bela, kiu estis la filino de la bajulo mem, kaj li kavalirece petis la rajton havi kun ŝi la unuan dancon de la vespera dancfestoj.

La bela Gertrud ruĝiĝis, ĉar ŝi volonte vidis Andrean; sed ŝi devis rifuzi lian oferon.

Tiam Andrea mallumiĝis, kaj klinis sin antaŭen, kaj flustris en ŝia orelo, kiu tiam iĝis sange ruĝa:

"Mia vi estos, eĉ se mi atendos dum dek jaroj. Dum ok horoj mi iris trans la monto por renkonti

vin, tial mi venis tro malfrue; sed venontfoje mi venos ĝustatempe, eĉ se mi devos iri rekte tra la monto!"

La festo finiĝis, la danco same. Ĉiuj pafistoj sidis ekster La Ora Ĉevalo, kaj Andrea estis inter ili; sed la poŝtestro Rudi sidis sur alta benko, ĉar li estis la majstropafisto, laŭ la reguloj kompreneble, sed Andrea reale.

Rudi volis kvereleti.

"Nu ja Andrea," li diris, "vi estas granda ĉasisto; sed vi scias: pafi la ĉamon estas nenio, kompare al ricevi ĝin."

"Se mi pafis ĝin, mi ricevis ĝin," respondis Andrea.

"Kiel bele! Al la ringo de Barbarossa ĉiuj pafis, sed neniŭ ricevis ĝin!" protestis Rudi.

"Kio estas la ringo de Barbarossa?" demandis fremdulo, kiu ne antaŭe estis en Göschenen.

"Ho," respondis Rudi. "Tie vi povas vidi ĝin!"

Kaj li fingromontris la monton, kie granda kupra ringo pendis de hoko. Kaj li pludiris:

"La imperiestro Frederiko Barbarossa ja iris ĉi tiun vojon al Italio; li iris sesfoje kaj lasis sin esti kronata, kaj en Milano kaj en Romo. Kaj ĉar li tiam iĝis german-romia imperiestro, li metigis tiun ringon en la monto je la germana flanko, kiel signo ke li edzigis Germanion al Italio.

Kaj kiam tiu ringo, diris la fabelo, estos levata el la hoko, tiam nuliĝos la geedzeco, kiu ne estis feliĉa."

"Tiam mi nuliĝos ĝin," diris Andrea, "kiel miaj patroj liberigis mian kompatindan landon Ticino el la tiranoj en Schwütz, Uri kaj Unterwalden."

"Ĉu vi ne estas svizo?" la bajulo demandis severe."

"Ne, mi estas italo de la svisa ĵurligo."

Samtempe li ŝargis la pafilon kaj enmetis ferkuglon. Celis kaj pafis!

La ringo estis levata elsube, kaj ne plu ligita al la hoko ĝi falis, la ringo de la Ŝtaŭfoj, de Barbarossa.

"Vivu la libera Italio!" kriis Andrea, kaj svingis sian ĉapelon.

Sed neniu respondis.

Andrea levis la ringon, donis ĝin al la bajulo kaj diris:

"Kaŝu tiun ringon, kiel memoron de mi kaj de ĉi tiu tago, ĉar vi agis al mi malĝuste."

Post tio, li iris al Gertrud kaj kisis ŝian manon. Kaj li iris supren laŭ la monto kaj malaperis; estis vidata denove kaj malaperis en nuboj. Sed post momento li estis denove vidata, pli alte. Ne estis li, ĉar estis lia giganta ombro sur la nuboj; kaj li staris kun pugno levita, minacanta, super la germana vilaĝo.

"Estis Satano mem!" diris la kolonelo.

"Ne, estis italo!" protestis la poŝtestro.

"Ĉar estas malfrua vespero," diris la bajulo,
"mi rakontos registaran sekreton, kiu estos en la gazeto morgaŭ."

"Aŭdu! Aŭdu!"

"Jes, oni telegrafas, ke kiam la franca imperiestro estis kaptita en Sedan, la italoj forĉasis la francajn soldatojn el Romo; kaj Viktoro Emanuelo ĝuste nun iras al la ĉefurbo."

"Tio estas granda novaĵo. Do finis la romaj promenoj de la germanoj! – Tion certe sciis Andrea, ĉar li tiel fanfaronis!"

"Li certe sciis pli ol tio!" diris la bajulo.

"Kion? Kion?"

"Ni vidu! Ni vidu!"

Kaj ili vidis.

Iun tagon, ili vidis fremdajn sinjorojn veni kun siaj instrumentoj kaj rigardi la monton; kaj aspektis kiel se ili serĉis la ringon de Barbarossa, ĉar ĝuste tien ili direktis la lornon. Kaj ili rigardis la kompason, kiel se ili ne sciis kie estas nordo kaj sudo.

Kaj estis granda vespermanĝo en La Ora Ĉevalo, kie la bajulo partoprenis. Tie oni parolis, dum la postmanĝo, pri milionoj kaj milionoj.

Iom poste ili vidis kiel La Ora Ĉevalo estis malkonstruata; kiel la preĝejon oni forportis,

pecon post peco, kaj kunmetis ilin iom for; ili vidis kiel la duona vilaĝo estis detruata, kiel oni konstruis kazernojn; kiel oni ŝanĝis la vojon de la rivereto, kaj la muelilaj radoj estis forigataj, la fabriko fermata, la bestoj vendataj.

Kaj tiam venis trimil nigraj laboristoj, kiuj parolis itale.

Tiam silentiĝis la belaj kantoj pri la malnova svisa lando kaj pri la puraj ĝojoj de la printempo.

Anstataŭe oni aŭdis tage kaj nokte batadon; kaj kie sidis la ringo de Barbarossa, tien oni metis montan borilon; kaj oni komencis pafi, ĉar tie la tunelo eniros la monton.

Nun estis, kiel oni sciis, tute ne malfacile fari truon en la roko; sed oni faru du truojn, po unu el ĉiu flanko; kaj la du truoj renkontiĝu, tute glate, kaj je tiu kredis neniuj, ĉar oni devis trairi dek kvin kilometrojn. Dek kvin kilometrojn!

"Imagu se ili ne rekontiĝos! Tiam ili devos rekomenci!"

Sed la ĉefa inĝeniero diris: Ili renkontiĝos.

Kaj Andrea el la itala flanko, li fidis la ĉefan inĝenieron, ĉar li mem estis celtrafa viro, kiel ni scias. Tial li aliĝis al la laboristaro, kaj iĝis la unua.

Tio estis laboro adaptita al Andrea. La lumon de la suno, la verdajn tapiŝojn kaj la blankajn alpojn li neniam plu vidis; sed li kredis ke li malfermis sian propran vojon al Gertrud, la vojon

tra la monto kiun li en fanfaronaj momento promesis venos.

Dum ok jaroj, li staris en la mallumo kaj laboregis. Nuda li plejofte estis, ĉar tie estis tridek plusaj gradoj. Foje ili venis al la fonto de rivero, kaj tiam li vivis en akvo; foje ili venis al tavolo de arĝilo, kaj tiam li vivis en malpuraĵo. Preskaŭ ĉiam, la aero estis malfreŝa, kaj la kamaradoj falis; sed venis novaj. Fine falis ankaŭ Andrea, kaj estis metata en malsanulejo. Tie li imagis al si, ke la du tuneloj neniam renkontiĝos, kaj tio plej suferigis lin. Neniam renkontiĝos.

Kuŝis ankaŭ Urianoj en la ĉambro kaj deliris; ilia ĉiama demando en senfebraj momentoj estis:

"Ĉu vi kredas ke ni renkontiĝos?"

Jes, neniam Ticinianoj kaj Urianoj tiel sopiris renkontiĝi kiel ĉi tie, en la monto. Ili sciis ke se ili renkontiĝos tie, tiam ĉesos miljara malamikeco, kaj ili falos repacigitaj unuj en la brakoj de la aliaj.

Andrea saniĝis kaj denove eklaboris. Li partoprenis la strikon en 1875; ĵetis iun ŝtonon, enkarceriĝis, sed denove liberiĝis.

En 1877 brulis Airolo, la vilaĝo kie li naskiĝis.

"Nun mi bruligis miajn ŝipojn malantaŭ mi; nun mi devas veni," li diris.

En 1879, la 19a de julio iĝis tago de funebro. La ĉefa inĝeniero de la tuta tunelo eniris la

monton por mezuri kaj kalkuli, kaj kiam li staris tie, li havis apopleksion kaj mortis! Meze sur la vojo! Tie li devus havi sian tombon, kiel Faraono, en la plej granda ekzistanta piramido; kaj lia nomo, Favre, estus tie ĉizita.

Tamen: la jaroj pasis. Andrea kolektis monon, sperton kaj forton. Li neniam vizitis Göschenen; sed unufoje jare li iris al la sankta arbaro kaj rigardis la detruon, kiel li nomis ĝin.

Li neniam vidis Gertrud, ne skribis al ŝi; tion li ne bezonis, ĉar li vivis kun ŝi en siaj pensoj, kaj li sentis, ke li ricevis ŝian volon.

Dum la sepa jaro, la bajulo mortis senmona.

"Kiel feliĉe ke li estis senmona!" pensis Andrea; kaj ne tiel pensis ĉiuj bofiloj.

Dum la oka jaro okazis io stranga. Andrea staris kiel unua homo plej interne en la itala tunelo kaj batis sian borilon. aero estis malmulta kaj sufokiga, do susuradis en liaj oreloj. Tiam li aŭdis kraketojn, similajn al tiuj de la lignovermo kiun oni nomas anobio.

"Ĉu venis mia lasta momento?" li pensis laŭte.

"Via lasta momento!" respondis io ene de li, aŭ ekster li. Kaj li timiĝis.

La postan tagon li denove aŭdis la kraketojn, sed pli klare, do li kredis ke estis la horloĝo kiun li portis.

Sed la postan tagon, kiu estis ripoza tago, li aŭdis nenion; kaj nun li kredis ke estis nur la

orelo; tiam li timiĝis kaj iris en la meson; kaj en silentaj pensoj, li plendis pri la nestabileco de la vivo. La espero perfidis lin, la espero sperti la grandan tagon, la espero ricevi la promesitan grandan premion por la unua pordo, kiu trairis la muron, la espero ricevi Gertrud.

Lunde li tamen denove staris unue kun sia borilo, sed senkuraĝa; ĉar li ne plu kredis ke li renkontos la germanojn en la monto.

Li batis kaj batis, sed sen fortoj, kiel lia malrapida koro batis post la tunela malsano. Tiam subite li aŭdis kvazaŭ pafon kaj grandan bruon, sed ene de la monto, je la alia flanko.

Kaj nun li ekkomprenis ke ili renkontiĝis.

Unue li genuiĝis kaj dankis Dion; poste li leviĝis kaj komencis bati. Li batis trans matenmanĝo, trans tagmanĝo; trans paŭzoj kaj vespermanĝo. Li batis per la maldekstra brako, kiam la dekstra sensentiĝis. Dume li pensis pri la ĉefa inĝeniero, kiu falis ĝuste antaŭ la muro; kaj li kantis la kanton de la tri viroj en la brulanta forno, ĉar la aero preskaŭ brilis ĉirkaŭ li, dum la akvo falis sur lian kapon kaj la piedoj staris en arĝilo.

Ekzakte je la sepa, la 28an de februaro 1880, li falis antaŭen al la borilo kiu flugis rekte tra la montomuro.

Soneganta "hu ra" el la alia flanko vekis lin, kaj li komprenis ke ili renkontiĝis, ke la lasta

momento de lia strebado venis, kaj ke li posedis dekmil lirojn.

Tiam, post mallonga spiro al la tutkompatanta, li metis la buŝon al la boriltruo, flustris, tiel ke neniu aŭdis: Gertrud; kaj post tio li naŭfoje hurais por la germanoj.

Dum la dekunua vespere, aŭdeblis tondranta atentu! el la itala flanko, kaj kun bruo kiel de sieĝopafilegoj la muro falis. Germanoj kaj italoj falis en la brakoj unuj de la aliaj kaj ploris, la italoj kisis, kaj ĉiu genuiĝis kaj kantis *Te Deum laudamus*.

Estis granda momento; kaj estis 1880, la sama jaro kiam Stanley vidis sufiĉe de Afriko kaj Nordensköld de la Vegaa vojaĝo.

Kiam la glorkanto al la eternulo silentiĝis, laboristo venis el la itala flanko kaj donis al la italoj pergamenon kun teksto. Estis honora kaj memora al la ĉefa inĝeniero, Louis Favre.

Li devos unue pasi la tunelon, kaj Andrea portos lian honoran memoron kaj lian nomon en la eta laborista trajno al Airolo.

Tion Andrea faris fidele, sidante sur puŝita vagono antaŭ la lokomotivo.

Estis granda tago! Kaj la nokto ne malpli.

Oni trinkis vinon en Airolo, italan vinon; kaj oni bruligis artfajradon. Oni faris paroladojn, al Louis Favre, Stanley kaj Nordensköld; oni faris paroladojn por Sankta Gothardo, la sekretiga

montomuro, kiu dum jarmiloj estis limo inter Germanio kaj Italio, inter nordo kaj sudo. Jes, ja disigis, sed ankaŭ kunigis. Ĉar Sankta Gothardo staris tie kaj same honeste donis sian akvon al la germana Rejno kiel al la franca Rono, al la Norda Maro kaj al la Meza...

"Kaj al la Adriatiko," interrompis certa Tessinare. "Bonvolu ne forgesi Ticino, kiu donas akvon al la plej granda rivero de Italio, la giganta Pado."

"Bone! Pli bone! Vivu Sankta Gothardo, la granda Germanio, la libera Italio kaj la nova Francio!"

Estis granda nokto! dum granda tago.

La venontan matenon, Andrea staris en la inĝeniera oficejo. Li estis vestita kiel itala ĉasisto, plumo en la ĉapelo, pafilo sur la ŝultro kaj tornistro sur la dorso; kun blanka vizaĝo kaj blankaj manoj.

"Do, nun vi havis sufiĉe de la tunelo?" diris la kas-inĝeniero, aŭ monulo kiel ili nomis lin. "Nu, neniu povas rifuzi al vi tion, kaj nun restas nur murlaboro. Do la finpago!"

La monulo malfermis libron, skribis papereton kaj kalkulis dekmil lirojn en oro.

Andrea desegnis sian parafon, metis la oron en la tornistro kaj foriris.

Li ĵetis sin sur laboristan trajnon; kaj post dek minutoj, li estis ĉe la falinta muro disiga.

Fajroj brulis en la monto je ambaŭ flankoj de la reloj, la laboristoj hurais por Andrea kaj svingis la ĉapojn. Estis agrablege!

Post dek pliaj minutoj li atingis la germanan flankon. Sed kiam li vidis taglumon en la pordo, la trajno ekstaris, kaj li eliris.

Kaj li iris al la verda lumo, kaj denove vidis la vilaĝon, sunplenan kaj verdantan; kaj la vilaĝo kuŝis tie nove konstruita, blanka, radianta, pli bela ol antaŭe. Kaj kiam li iris al la laboristoj, ili salutis sian unuan homon.

Rekte al dometo li iris; kaj sub juglanda arbo sub la abelujoj staris Gertrud, trankvila, pli bela, pli milda, ĝuste kiel ŝi starus tie kaj atendis lin, dum ok jaroj.

"Nun mi venas," li diris, "kvazaŭ mi venus rekte tra la monto! – Ĉu vi sekvas min al mia lando?"

"Mi sekvas vin kien ajn vi volas."

"La ringon vi jam havas; ĉu ankoraŭ?"

"Jes ja!"

"Do ni tuj iru! – Ne, ne turnu vin; nenion vi rajtas kunporti!"

Kaj ili iris manenmane! Sed ili ne iris al la tunelo.

"Al la monto!" diris Andrea, kaj iris la malnovan vojon. "Tra la mallumo estis mia vojo al vi; nun mi volas vivi en la lumo kun vi, kun vi!"

Jabalo sen mi

Iam estis reĝo nomata *Johano sen lando*, oni povas diveni kial. Sed alian fojon estis granda kantisto, kiun oni nomis *Jabalo sen mi*, kaj vi nun scios kial.

Klang estis lia nomo, kiun li ricevis de sia patro, la soldato, kaj estis muziko en la nomo. Sed la naturo donis al li ankaŭ fortan volon, kiu sidis kiel fera stango en la dorso, kaj tio ja estas granda donaco, por uzi en la luktoj de la vivo. Jam kiel infano, kiam li komencis paroli, li ne diris kiel aliaj knabetoj "li" kiam li parolis pri si mem, sed li tuj nomis sin mem "mi". "Vi ne havas mion!" diris la maljunuloj. Kiam li estis iom pli maljuna, li esprimis volon kun "mi volas". Sed tiam li aŭdis:

"Vi ne havas volon," kaj "via volo kreskas en la arbaro."

Tio estis senpripense de la soldato, sed li ne komprenis pli bone, ĉar li estis soldato kaj lernis deziri nur tion kion la oficiroj volis.

La juna Klang trovis ke estis strange ke li "ne havis volon", kvankam li havis tian tiel fortan, sed ja estis tiel.

Kiam li iom kreskis, la patro iun tagon demandis: "Kio vi volas iĝi?"

Tion la knabo ne scis, kaj li ne plu volis, ĉar estis malpermesite. Li ja sopiris la muzikon, sed

tion li ne kuraĝis diri, ĉar li kredis ke tiam oni malhelpos tion. Tial li respondis kiel obeema filo: "Mi volas nenion."

"Tiam vi estos vinfaranto!" diris la patro.

Ĉu ĉar li konis vinfariston, aŭ ĉar la vino aparte tiris lin, oni ne povas diri. Nu ja, la juna Klang estis metata en vinkelo, kaj tie li ne fartis malbone.

Odoris tiel bone de ruĝa lako kaj franca vino tie malsupre, kaj estis grandaj, volbitaj ĉambroj kiel preĝejoj. Kiam li sidis ĉe la barelo kaj la ruĝa vino fluis, li iĝis ĝoja kaj komencis kanteti, unue la kantojn kiujn li aŭdis.

La mastro, kiu vivis en vino, ŝatis kanton kaj ĝojon, kaj li lasis la junulon daŭriĝi; sonis tiel bone sub la volboj. Kaj kiam li ekkantis "La profundaj keloj", tiam aĉetantoj venis suben, kaj tion la mastro ŝatis.

Do dum iu bela tago venis komerca vojaĝisto, kiu antaŭe estis teatra kantisto; kaj kiam li ekaŭdis Klang, li tiom ŝatis tion ke li invitis Klang al festo vespere.

Kaj ili renversis keglojn, ili manĝis kankrojn kun aneto, ili trinkis punĉon, kaj precipe ili kantis.

Private, kaj kiam ili ciiĝis, la komerca vojaĝisto diris:

"Kial ci ne iras al la teatro?"

"Mi?" respondis Klang; "mi ja ne povas."

"Ci diru: mi volas! kaj ci povos."

Tio estis nova lernaĵo, ĉar ekde li havis pli ol tri jarojn, la juna Klang ne uzis la vortojn "mi" kaj "volas."

Nun li kuraĝis nek voli nek deziri, kaj li petis ne esti plu tentata.

Sed la komerca vojaĝisto revenis, multajn fojojn, kaj havis kun si kantistegojn. La tento iĝis tro forta; kaj Klang faris sian decidon iun vesperon, kiam lin laŭdis vera profesoro.

Do li adiaŭis la mastron, kaj ĉe glaso li dankis sian amikon la komercan vojaĝiston, kiu redonis al li memfidon kaj volon; "la volo, tiu fera stango en la dorso, danke al kiu la homo iras rekte kaj ne sur kvar piedoj". Kaj neniam li forgesos sian amikon, kiu montris al li kiel fidi sin mem.

Kaj li iris por adiaŭi siajn gepatrojn.

"Mi volas iĝi kantisto!" li diris laŭte en la domo.

La patro serĉis la vipilon, kaj la patrino ploris; sed tio ne helpis.

"Ne perdu vin mem, filo mia!" estis la lastaj vortoj de la patrino.

La juna Klang ricevis monon por iri al fremda lando. Tie li lernis kanti ĝuste laŭ la reguloj, kaj dum kelkaj jaroj li iĝis granda grandkantisto. Gajnis monon kaj ekhavis propran direktoron, kiu aranĝis koncertojn.

Nun floris la amiko Klang, kaj li povis diri kaj mi volas kaj mi ordonas. Lia egoo kreskis tute nenature, kaj li ne toleris aliajn miojn proksime al si. Li rifuzis al si nenion, kaj li ne neis sin mem. Sed nun, kiam li devus reiri al sia lando, la direktoro diris al li ke ne taŭgas nomiĝi Klang, kiam oni estas grandkantisto; li devis akcepti belan nomon, preferinde alilandan, ĉar tio estis kutimo.

"La Grandulo" luktis kun si mem; ĉar ŝanĝi nomon ja ne estis tre agrable; similis al neo de siaj gepatroj, kaj tio povus aspekti malbone.

Sed ĉar tio estis kutimo, devis esti tiel.

Li serĉis en la Biblio, por trovi la ĝustan nomon, ĉar tie ili estis.

Kaj kiam li trovis Jabalon, la filon de Lemeh, kiu inventis plurajn ludojn, li prenis tion. Estis bona nomo kaj signifis Trumpeto en la hebrea. La direktoro estis angla, do li volis ke Klang nomi sin mister, kaj tion li faris. Mister Jabalo, do.

Ĉio ja estis sufiĉe senkulpa, kiel kutime, sed strange ja estis, ke kun la nova nomo, Klang iĝis alia viro. La antaŭa estis preskaŭ forigita; kaj mister Jabalo sentis sin naskita anglo, parolis kun fremda akcento, ekhavis flankbarbon kaj altajn kolumojn; jes, la kvadratitaj vestaĵoj mem kreskis kiel la ŝelo sur la arbo; li iĝis strikta kaj salutis per unu okulo; neniam turniĝis, kiam

konatulo vokis lin sur la strato, kaj li ĉiam *staris* meze en la tramo.

Li apenaŭ rekonis sin mem!

Tamen li denove estis en sia lando kaj estis grandkantisto ĉe la opero. Li ludis reĝojn kaj profetojn, liberec-heroojn kaj demonojn; kaj kiam li devis ekzerci rolon, tiam li estis tiel bona ludisto, ke li kredis sin esti tiu kiun li prezentis.

Nun li iun tagon iris sur la strato kaj estis demono ie, sed li estis ankaŭ mister Jabalo.

Tiam li aŭdis iun voki malantaŭ li: "Klang!" Li kompreneble ne turnis sin, ĉar tiel ne agas anglo, kaj cetere li ja ne plu nomiĝis Klang.

Sed denove estis vokata "Klang!" Kaj jen staris lia amiko la komerca vojaĝisto antaŭ li, kun demandantaj rigardoj, kaj demandis timide kaj ĝentile:

"Ĉu ne estas Klang?"

Mister Jabalo estis atakata de la demono, montris ĉiujn dentojn, kaj kun malfermita buŝo, kvazaŭ li sendis brustan tonon el unu el la kavaĵoj de la kranio, li kriis mallongan: "Ne!"

Tiam la amiko rekonis lin, kaj foriris. Li estis klera homo, konis la vivon kaj la homojn kaj sin mem parkere, kaj tial li iĝis nek malgaja nek surprizata.

Sed mister Jabalo kredis tion; kaj kiam li aŭdis tiujn vortojn ene de si: "Antaŭ ol dufoje krios koko, vi trifoje malkonfesos min," tiam li

faris kiel Petro; li eniris pordon kaj maldolĉe ploris. Tion li faris, en siaj pensoj, sed la demono en lia koro ridis.

Ekde tiu tago li ĉefe ridis; al malbona, al bona, al funebro kaj honto, al ĉio kaj ĉiuj.

Liaj gepatroj ja sciis pro la gazetoj kiu estis mister Jabalo, sed ili neniam vizitis la operon, ĉar ili kredis ke temis pri barelbendoj kaj ĉevaloj, kaj tie ili ne volis vidi sian filon.

Mister Jabalo nun estis la plej granda grandkantisto, kaj li ja vendis grandan parton de sia mio, sed la volon li ankoraŭ havis.

Kaj venis lia tago! Estis en la baleto eta knabino, kiu povis ravi virojn, kaj ankaŭ Jabalo iĝis ravata. Tiel ege ravata ke li demandis ĉu li povos iĝi ŝia... (Li ja volis diri ke ŝi iĝos lia, sed tiel oni ne rajtas paroli.)

"Vi rajtos iĝi mia," la sorĉantistino diris, "se mi rajtos..."

"Vi rajtos ĉion!" diris Jabalo.

Ŝi kredis liajn vortojn, kaj ili geedziĝis. Unue li instruis al ŝi kanti kaj ludi, kaj poste ŝi ricevis ĉion kion ŝi deziris. Sed ĉar ŝi estis sorĉantistino, ŝi deziris ĉion kion li ne deziris, kaj finfine ŝi havis lian volon en sia poŝo.

Belan tagon, mistress Jabalo estis grandkantistino; kaj tiel granda, ke kiam la publiko vokis Jabalo, tio signifis la sinjorinon kaj ne la sinjoron.

Jabalo volis denove bati sin supren, sed fari tion je la kosto de la edzino, tion li ne volis, kaj tial li ne povis.

Li komencis esti neniigata kaj forgesata.

La lumanta cerklo de amikoj, kiujn mister Jabalo kunigis en sia fraŭla hejmo, nun kolektiĝis en lia hejmo ĉirkaŭ sinjorino Jabalo, kiun oni nomis nur Jabalo.

Neniu rigardis la sinjoron, neniu trinkis kun li; kaj se li provis paroli, neniu aŭskultis lin; estis kvazaŭ li ne ekzistus, kaj lian edzinon oni traktis kiel se ŝi ne havus edzon.

Tiam mister Jabalo iĝis sola, kaj sola li iris al la kafejo.

Tien li venis dum vespero por serĉi kompanion. Li pretis toleri iun ajn, se nur estis homo.

Tiam li ekvidis sian malnovan amikon la komercan vojaĝiston sidi sola kaj enui; kaj li pensis: "tie mi havas homon en la maljuna Lundberg;" kaj li iris al la tablo kaj salutis. Sed tiam aliiĝis la vizaĝo de la amiko, tiel terure, ke Jabalo devis demandi: "Ĉu ne estas Lundberg?"

"Jes."

"Ĉu ci ne rekonas min, Jabalon?"

"Ne!"

"Ĉu ci ne rekonas Klang, cian malnovan amikon?"

"Ne! Li mortis antaŭlonge."

Tiam Jabalo komprenis ke li estis morta en certa maniero, kaj li eliris.

Poste li adiaŭis la operon kaj iĝis kantoinstruisto kun la titolo de profesoro.

Kaj li vojaĝis al fremda lando, kaj estis for dum multaj jaroj.

Pro la funebro kaj la ĉagreno, li maljuniĝis frue.

Sed tion li ŝatis, ĉar tiam ne restis multo. Tamen li ne iĝis maljuna tiel rapide kiel li volis, kaj tial li ekhavis blankan perukon kun longaj bukloj. Kaj en ĝi li sentis sin bone, ĉar ĝi igis lin nerezonebla, ankaŭ al si mem.

Kun malrapidaj paŝoj kaj la manoj surdorse li iris sur la trotuaroj kaj pensis; oni kredis ke li serĉis iun aŭ atendis iun. Se iu vidis liajn okulojn, li ne trovis rigardon en ili; se iu provis konatiĝi kun li, li nur babilis. Kaj li neniam diris "mi", neniam "mi kredas", sed "ŝajnas". Li perdis sian mion, kaj tion li komprenis iun tagon, kiam li devis razi sin. Li metis sapon en la vizaĝo kaj devis uzi la tranĉilon antaŭ la spegulo, Li vidis kaj vidis la ĉambron malantaŭ si, sed sian vizagon li ne vidis. Tiam li komprenis kiel estis. Kaj li ekhavis fortan sopiron retrovi sian mion. La plej bonan parton li donis al sia edzino, kiu ricevis lian volon, kaj li decidis serĉi ŝin.

Kaj kiam li revenis al sia lando kaj iris sur la stratoj de la urbo en sia blanka peruko, tiam neniu

rekonis lin. Sed muzikisto, kiu estis en Italio, diris laŭte sur la strato: Jen majstro.

Kaj tuj Jabalo sentis sin kvazaŭ li estus granda komponisto. Li aĉetis al si notpaperojn kaj komencis skribi partiturojn, tio estas, li skribis amason de longaj kaj mallongaj notoj sur la linioj, kelkaj por la violonoj kompreneble, aliaj por la lignaj instrumentoj kaj la ceteraj por la ladaĵ. Poste li sendis tion al la konservatorio. Sed neniu povis ludi tion, ĉar estis nenio, nur notojn.

Kaj li iun tagon iris sur la strato, kaj renkontis pentriston, kiu estis en Parizo. "Tie iras modelo," diris la pentristo. Tion aŭdis Jabalo, kaj li tuj kredis ke li estas modelo; ĉar li kredis ĉion kion oni diris pri li, ĉar li ne sciis kiu aŭ kio li estis.

Kiam li tiam memoris sian edzinon, kiu ricevis lian mion, li decidis serĉi ŝin. Kaj tion li faris, sed ŝi reedziniĝis al barono, kaj vojaĝis longe foren.

Tiam li laciĝis pri la serĉado; kaj kiel ĉiuj lacaj viroj, li eksopiris la originon de siaj tagoj, sian patrinon. Li sciis ke ŝi sidis kiel vidvino en domaĉo ie en la montoj, kaj tien li iris.

"Ĉu vi ne rekonas min?" li demandis.

"Kio estas via nomo?" demandis la patrino.

"Kiun nomon havas via filo, ĉu vi ne scias tion?"

"La nomo de mia filo estis Klang, sed via ja estas Jabalo, kaj tiun mi ne konas."

"Ŝi neas min!"

"Kiel vi neas vin mem kaj vian patrino."

"Kial vi forprenis mian volon, kiam mi estis infano?"

"Vian volon vi donis al virino."

"Mi devis, se ne, mi ne ricevus ŝin. Sed kial vi diris, ke mi ne havas iun volon?"

"Ho, tion faris via patro, kara infano; kaj li ne komprenis pli bone. Pardonu lin nun, ĉar li estas morta. Cetere infanoj ne havu volon, sed plenkreskintaj viroj havu."

"Imagu ke vi povas kompreni tion tiel bone, patrino! Infanoj ne havu ĝin, sed plenkreskintoj jes ja."

"Aŭdu, Gustav," diris la patrino; "Gustav Klang..."

Tio estis liaj du nomoj; kaj kiam li aŭdis ilin, li denove iĝis li mem. Ĉiuj roloj, reĝoj kaj demonoj, la majstro kaj la demono vaporiĝis, kaj li estis nur la filo de sia patrino.

Tiam li metis sian kapon en ŝia sino kaj diris:

"Nun mi volas morti! Mi volas morti!"

La oraj helmoj en Ålleberg

Anders naskiĝis en Vestrogotio kaj dum sia junaĝo marŝis cirkaŭ la tuta landu kun la ulnostango kaj la ŝtofaro. Sed iun tagon li kredis ke estis pli bone marŝi kun pafilo kaj uzi la vestaĵojn de la armeo, kaj tial li tie rekrutiĝis. Pro tio, li iam estis komandata al Stokholmo por gardi.

La amiko Kask, tiel li nomiĝis nuntempe, iun tagon ricevis forpermeson; kaj do li iros al Skansen. Sed kiam li venis al la pordo, li ne havis duonkoronon kaj do devis resti ekstere. Li rigardis tiel longe al la palisaro kaj pensis: mi ĉirkaŭiros, ĉiam troveblas palisoŝtuparo; se necesos, mi grimpos.

Estis la sunsubeniĝo, kiam li sekvis la lagorandon kaj iris laŭ la montoradiko; sed la palisaro videblis alte en la aero, kaj el la alia flanko oni aŭdis kanton kaj muzikon. Kask iris kaj iris, ĉirkaŭe, ĉirkaŭe, sed li ne vidis palisoŝtuparon, kaj la palisaro malaperis en la nuksoarbaro. Laca, li sidiĝis sur la tero por senŝeligi nuksojn.

Tiam venis sciuro kaj metis la voston en la aero.

"Ne tuŝu miajn nuksojn!" la sciuro diris.

"Bone, se vi montros al mi la vojon al la palisoŝtuparo," diris Kask.

"Parton de la vojo," respondis la sciuro.

Li saltis unue kaj la soldato poste. Kaj la sciuro malaperis.

Tiam venis erinaco, kraketante en la folioj.

"Sekvu min," li diris, "kaj vi vidos la palisoŝtuparon."

"Provu tion! Ne dankon."

Sed la erinaco tamen akompanis lin.

Tiam venis la vipuro. Estis bona ulo; li povis lispri per la lango kaj tordiĝi.

"Tekvu min," li diris, "kaj vi vidot la palitoŝtuparon."

"Mi sekvas," diris Kask.

"Ted vi ettu bona; vi ne tretu min! Mi ŝatas la belan."

"Tiel bona viro ne estas soldato," diris Kask, "sed mi ne portas la rajdstivalojn, tamen."

"Tretu lin," diris la erinaco, "aŭ li mordos vin tiel bone!"

Samtempe, la serpento parolis false kaj forlasis la hokon.

"Atentu!" diris la erinaco, kaj atakis la serpenton. "Mi ne estas tiel bela, sed mi ja montras miajn stangetojn."

Kaj li finigis la serpenton, kaj malaperis.

Nun la soldato staris sola en la arbaro kaj pentis ke li rifuzis la akran erinacon.

Mallumiĝis, sed la duona luno videblis inter la betulaj folioj, kaj estis tute silente.

Tiam la soldato kredis, ke li vidis grandan, flavan manon, kiu moviĝis, tien kaj reen. Li iris tien, kaj ekvidis ke estis acera folio, kiu ofte movas tiel la fingrojn, kaj oni ne scias kion tio signifas.

Dum li staris kaj rigardis, li aŭdis tremolon tremi.

"Fi, mi frostas!" diris la tremolo, "ĉar miaj piedoj malsekiĝis; kaj mi tiel timas."

"Pri kio vi do timas!" demandis la soldato.

"Ho, sidas etulo en la monto."

Tiam la soldato komprenis kion la acero volis diri, kaj li vere vidis etulon sidi en la monto kaj prepari kaĉon.

"Kio vi do estas?" diris la etulo.

"Mi loĝas en Vässkötta-Dal, kie vi estas?"

"Mi ja estas en Ålleberg," diris la etulo.

"Sed Ålleberg estas en Vestrogotio," respondis la soldato.

"Ni translokiĝis tien, nun!" diris la etulo.

"Nun vi mensogis," diris la soldato, prenis lin kaj metis la kaĉon en la fajro.

"Nun ni vidos Musosanigon," li diris kaj iris en la monton.

Tie la giganto sidis ĉe granda fajro kaj igis feran stangon ardi.

"Bonan tagon, bonan tagon," diris la soldato kaj donis la manon.

"Bonan tagon al vi mem!" la giganto respondis kaj donis la feran stangon, ankoraŭ ruĝan.

Kask ricevis la feron kaj premis ĝin, ĝis ĝi siblis.

"Vi havas varmajn manojn! Kiel vi nomiĝas?"

"Mi nomiĝas la giganto Svedo," diris la trolo.

"Estis malnova, bona manpremo, estis sveda, kaj nun mi komprenas ke mi estas en Ålleberg. Eble la Oraj Helmoj dormas tie ankoraŭ?"

"Silentu! silentu! silentu!" diris la giganto kaj minacis per la fajrostango. "Vi vidis ilin, ĉar vi venas de Vässkotta-Dal; sed vi solvu mian enigmon," opiniis la giganto.

"Se vi volas kvereli kun samlandano, do bone! Sed unue formetu la fajroforkon."

"Jes, Kask, vi recitu la svedan historion dum mi fumas pipeton, kaj vi poste vidus la Orajn Helmojn; la tutan svedan historion."

"Mi donos pli ol tio, kvankam mi ne estis eksterordinara kaporalo. – Sed unue mi iom memoru, tamen."

"Sed estas unu kondiĉo: vi ne rajtas nomi la nomon de iu reĝo, ĉar tiam ili koleriĝos interne; *kaj kiam ili koleriĝas, tiam vi scias...*"

"Tio vere estis malfacile; sed vi lumigu la pipon, kaj mi komenciĝas. Jen vi havas fajron!"

La soldato premis sian kapon dum momento, poste li komencis:

"Unu, du, tri! La jaro 1161, ĉirkaŭ tiam Svedio ekestis; unu regno, unu reĝo kaj unu arĉepiskopo – ĉu tio sufiĉas!"

"Ne," diris Svedo, "estis maltro. Ankoraŭ unu fojon!"

"Do ĉi tiel! – En la jaro 1359, la sveda popolo estis preta, ĉar tiam kunvenis la kvarstata parlamento, kaj ĝi restis kun interrompoj ĝis 1856."

"Vi ja estas soldato," diris Svedo, "do vi parolu iom pri militoj."

"Estis nur du militoj, kiuj ion signifas; kaj ili finiĝis per du pacoj, tiu en Brömsebro en 1645, kiam ni ricevis Härjedalen, Jämtland kaj Gotlandon, kaj tiu en Roskilde en 1658, kiam ni ricevis Skanion, Halland, Blekinge kaj Bohuslän. Kaj per tio, la sveda historio estas finigita; la cetero estis nur interbataloj."

"Nu ja, sed la konstitucioj?"

"Jes, ni havis aŭtokration ekde 1680 kaj ĝi restis ĝis 1718; poste estis la libereca tempo ĝis 1789, kiam revenis la aŭtokratio. Kaj Adlersparre faris revolucion en 1809 kaj lasis Hans Järta skribi la konstitucion, kiu ankoraŭ vivas. Nun vi ne devas scii pli. – Ĉu vi finfumis la pipon?"

"Nu!" diris la giganto. "Tio estis ĝuste. Kaj nun vi vidis la Orajn Helmojn!"

La oldulo kun malfacilaĝo levis sin kaj iris en la monton, sekvata de la soldato.

"Iru silente," diris la giganto kaj montris kavaliron, kiu sidis kaj dormis ĉe roka pordo. Sed en la sama momento, Kask stumblis kaj batis siajn kalkanumajn ferojn al ŝtono, tiel ke iĝis fajro. Tiam tuj vekigis la Ora Helmo; kaj same rapide kiel se li dormus dum la gardado, li kriis:

"Ĉu estas jam tempo?"

"Ne ankoraŭ!" respondis la giganto.

La orhelmkavaliro sidiĝis kaj tuj denove ekdormis.

La giganto malfermis la montomuron, kaj la soldato vidis grandan halon antaŭ si. Senfina tablo estis meze en la halo, kaj en la duona krepusko, oni vidis la lumantan aron de oraj helmoj sidi en apogseĝoj kun oraj kronoj sur la dorsaj apogiloj. Ĉe la mallonga flanko sidis viro unu kapon pli longa ol la aliaj; kaj lia barbo atingis la talion, kiel ĉe Moseo aŭ Jesajo; kaj li havis la klabon en sia mano.

Ĉiuj ŝajnis dormi, sed ne la dormon kiu nokte redonas fortojn, ankaŭ ne la dormon kiun oni nomas eterna.

"Nun atentu," diris la giganto, "kaj vi aŭdos la jubilegan meson."

Li premis grandan grenaton en la montomuro, kaj mil flamoj ekbrulis.

Tiam la oraj helmoj vekigis.

"Kiu tie?" demandis la viro kun la profeta barbo.

"Svedo! respondis la giganto.

"Bona nomo!" diris Gustav Eriksson Vasa, ĉar estis li. "Kiu tempo estas?"

"La jaro post la naskiĝo de Kristo mil naŭcent kaj tri."

"La tempo iras. Ĉu iris ankaŭ vi? Ĉu vi ankoraŭ estas unu lando kaj unu popolo?"

"Ni estas! Sed post Gustavo la unua, la lando kreskis. Kun Jämtland, Härjedalen kaj Gotlando."

"Kiu prenis ilin?"

"Tio okazis sub la reĝino Kristina. Sed ja ŝia kuratoro prenis ilin."

"Kaj poste?"

"Poste ni ekhavis Skanion, Halland, Blekinge kaj Bohuslän."

"Ho mil! Kaj kiu prenis ilin?"

"Karlo la deka Gustavo."

"Kaj post tio?"

"Poste ne estas pli!"

"Ĉu tio estas ĉio?"

Nun iu frapis la tablon.

"Eriko la Sankta petas la vorton!" diris Gustav Vasa.

"Erik Jedvardson estas mia nomo, kaj sankta mi neniam estis. Ĉu mi rajtas demandi al Svedo kien iris mia Finnlando?"

"Finnlando reiris al Ruslando pro propra peto de la membroj de la Anjala-alianco, kaj per la paco en Fredrikshamn en 1809, kiam la finnoj laŭdis la caron."

Gustavo 2a Adolfo petis la vorton.

"Kie estas la baltmaraj landoj?" li demandis.

"Reprenitaj de la posedantoj," respondis Svedo.

"Kaj la imperiestro, ĉu li restas?"

"Estas du imperiestroj, unu en Berlino kaj unu en Vieno."

"Du habsburgoj?"

"Ne, unu habsburgo kaj unu hohenzollero, kaj tion oni nomas la unuecon de Germanio, diris Bismarck!"

"Nekompreneble! ... Kaj la katolikoj en norda Germanio, ĉu ili estis konvertitaj?"

"Ne! La katolikoj estas la plimulto en la nordgermana parlamento, kaj la berlina imperiestro agas al la kardinala kolegio por povi decidi kiu estos papo."

"La papo do ankoraŭ estas?"

"Ho jes, li estas, kvankam ĵus mortis unu."

"Kaj kion volas la brandenburgo en Romo?"

"Oni ne scias; kelkaj diras ke li volas iĝi rom-germana imperiestro de la evangelia konfesio."

"Sinkretisma imperiestro kiel sonĝis Johano Georgo de Saksio. Nun mi ne volas aŭskulti pli."

La vojoj de la Providenco estas miraklaj kaj ni mortontaj, jes, kio estas ni? Tero kaj cindro!"

Karlo 12a petis la vorton.

"Ĉu Svedo povas diri al mi kio nun estas Pollando?"

"Pollando ne plu estas. Estas dividita!"

"Dividita? Kaj Ruslando?"

"Ruslando ĵus celebris la fondon de Peterburgo, kaj la urbestro de Stokholmo partoprenis la procesion."

"Kiel malliberulo?"

"Ne, kiel invitita. Ĉiuj nacioj nun estas iom amikaj, kaj en Ĉinio antaŭ nelonge franca armeero libervole staris sub germana feldmarŝalo."

"Eksterordinare! Ĉu oni nuntempe estas amiko de sia malamiko?"

"Jes, oni estas trafenetrata de la etoso de la kristanismo, kaj oni havas ĉiaman pacjuĝejon en Hago."

"Kion oni ja havas?"

"Pacjuĝejon."

"Do finiĝis mia tempo! Okazu la volo de Dio!"

La reĝo subenigis la vizieron de la helmo kaj ne plu parolis.

Karlo 11a petis la vorton.

"Nu, Svedo, kiel staras la financoj de la malnova Svedio?"

"Estas malfacile diri, ĉar mi ne kredas ke ili bone komprenis la kalkuladon. Sed unu afero, aŭ du: ke duono de la sveda tero estas lombardita eksterlande, por preskaŭ 300 milionoj."

"Ho, milda Dio!"

"Kaj la ŝuldoj de la komunumoj estas preskaŭ 200 milionoj."

"200?"

"Kaj dum la jaroj 1881-1885, elmigris 146 mil svedoj."

"Ne lasu min aŭdi pli!"

Gustav Vasa batas per la klabo la tablon.

"Pro ĉio kion mi aŭdis, ne estas bone en la lando. Maldiligentaj vi estas, enviaj, senzorgaj; ne rapide farantaj ion, rapide malhelpantaj ilin. Sed vi, Svedo, kiel fartas mia eklezio kaj miaj pastroj?"

"La pastroj de la eklezio estas terkulturistoj kaj laktaĵistoj; la episkopoj gajnas ĝis 30 mil kronojn kaj kolektas monon, ĝuste kiel antaŭ la decido de Västerås; cetere ili preskaŭ ĉiuj estas herezuloj, aŭ liberpensantoj, kiel ni nomas ilin. Ili certe ankoraŭ atendas ian reformacion, kiel ajn ĝi estos."

"Tiel? Tiel? ... Sed kiu muziko kaj kanto estas tie supre?"

"Tio estas Skansen! Estas monto, sur kiu oni kolektis ĉiujn patrolandajn memoraĵojn, kiel antaŭsentante la finon oni skribas sian

testamenton kaj kolektas memoraĵojn pri la pasinteco. Tio montras respektojn al la patroj, sed ne estas pli ol tio."

"Estas evidente de ĉi tiu jubileo ke la verkojn kaj agojn de la patroj voris la fluo de la tempo; kelkaj flosas, aliaj sinkas. Ĉi tie ni sidas kiel ombroj de ni mem, kaj por vi vivantoj ni ne devas esti pli... Estingu la lumojn!"

La giganto Svedo estingis la lumojn kaj eliris, proksime sekvata de la soldato, kiun li petis eniri kvazaŭ kaĝon.

"Se vi nun parolas pri ĉi tio," diris la giganto, "vi estas malfeliĉa."

"Jes, tion mi komprenas," respondis Kask. "Sed mi memoros tion! Tamen pensu: ke tiuj, kiuj fordrinkis la malnovan Svedion kaj lombardis ĝin eksterlande! – Ja estas tute terure; se estas vere!"

"Krak!" diris en la turbino; la lifto supreniris kun la soldato, supren al Skansen. Kaj tie li staris meze en la sunsubeniro, ĝuste kiam sonis Håsjöstapeln kaj Gustav Vasa eniris Stokholmon ĉirkaŭata de siaj dalekarlianoj.

La liceno trovas la Orpudron

La riĉulo iam venis al la malriĉa insulo kaj enamiĝis en li. Kial, tion la riĉulo ne povis diri, sed li estis ravita; eble tiu insulo similis al forgesita infanaĝa memoro aŭ al bela sonĝo.

Li aĉetis la insulon, konstruis vilaon kaj plantis multajn arbojn, arbustojn kaj florojn. La maro estis ekstere; propran ponton li havis kun flagstango kaj blankaj boatoj; kverkoj, grandaj kiel preĝejoj, ombris lian domon, kaj freŝaj ventoj ŝvebis super verdaj herbejoj. Li havis edzinon, infanojn, servistojn, tirbestojn; li havis ĉion, sed unu afero mankis al li; estis bagatelo, sed la plej grava el ĉiuj, tio kion li forgesis pripensi: estis fontoakvo. Oni fosis putojn kaj eksplodigis la monton, sed venis nur sala, bruna akvo. Ĝi estis filtrata, iĝis klara kiel kristalo, sed restis sala. Jen la malgajeco.

Tiam venis, dum tiuj tempoj, iu plena de la graco de la Sinjoro, iu kiu sukcesis pri ĉiuj siaj planoj, kaj kiu estis unu el la plej famaj homoj de la mondo. Ni memoras kiel li batis sian diamantan bastonon al la monto kaj, kiel Moseo, li devigis la rokon doni akvon. Nun oni diamante boros, kiel oni boris en aliaj montoj kaj ricevis akvon el ĉiuj. Oni boris tie, por cent regnaj taleroj, por mil, por plurmil, sed oni ricevis nur salan akvon. Ĉi tie evidente ne estis beno; kaj la riĉulo

bone rimarkis, ke oni ne ricevos ĉion por mono, eĉ ne trinkaĵon de freŝa akvo, kiam oni estas malbonŝanca.

Tiam li ekhavis pezan animon, kaj la vivo ne plu ridetis. Sed la lernejestro sur la insulo komencis legi malnovajn librojn; kaj li venigis maljunulon kiu iris kun divenvergo; sed tio ne helpis.

Sed la pastro, kiu estis pli saĝa ol tio, iun tagon kolektis la lerneajn infanojn, kaj promesis premion al tiu, kiu povos trovi herbon nomita la Orpudro, kaj kiu montros ŝprucfontojn.

"Ĝi havas florojn kiel la alĉemilo kaj foliojn kiel la saksifrago. Kaj aspektas kiel ora polvo sur la plej superaj folioj. Nun memoru tion!"

"Floroj kiel la alĉemilo, kaj folioj kiel la saksifrago," la infanoj ripetis; kaj ili kuris en la arbaron por serĉi la Orpudron.

Neniu el la infanoj trovis ĝin. Knabeto ja venis kun la vulpolakto, kiu havas iom da oro plej supre; sed ĝi estas venena, kaj ne estis ĝi. Kaj ili laciĝis en la serĉado.

Sed estis knabineto, kiu ne ankoraŭ ĉeestis la lernejon; ŝia patro estis dragono, posedis farmeton, estis pli malriĉa ol riĉa. Lia sola trezoro estis la eta filino; kaj al ŝi oni en la vilaĝo donis la belan nomon Liceno, ĉar ŝi ĉiam portis ĉielbluan puloveron kun larĝaj manikoj, kiu ŝvebis kiam ŝi moviĝis. La liceno cetere estas eta,

blua papilio Ŝi do havis la kolorojn de tiu eta papilio, videbla en la altaj teroj sur herbofolioj, kaj liaj flugiloj similas al la folioj de la linfloro, fluganta linfloro kiu havas buŝajn palpilojn, kie sidas la polvaj kordoj plena somero sur herberoj, kaj liaj flugiloj similas al la folioj de la linoflora, fluganta linblomo kiu havas buŝ-antenojn, kie sidas la polvo-kordoj.

Liceno, do tiu de la dragono, estis nekutima infano, parolis tiel prudente sed strange, do neniu sciis de kie ŝi prenis la vortojn. Ĉiuj homoj ŝatis ŝin, kaj ankaŭ la bestoj; gekokoj kaj bovidoj sekvis ŝin, kaj ŝi kuraĝis karesi eĉ la virbovon. Ŝi ofte eliris sola, restis for, kaj revenis; sed kiam oni demandis kie ŝi estis, ŝi ne povis diri tion. Kaj tamen ŝi povis tiel multe rakonti. Ŝi vidis nekutimajn aferojn, kaj renkontis kaj maljunulojn kaj edzinojn, kiuj diris tion kaj ĉi tion. La dragono lasis ŝin daŭriĝi, ĉar li kredis ke li rimarkis ke iu protektis ŝin.

Iun matenon, Liceno ekvagadis. Tra herbejoj kaj boskoj ŝi gvidis siajn paŝetojn; kaj ŝi ĉefe kantis al si mem, kantojn kiujn neniu aŭdis antaŭe kaj kiuj venis al ŝi. Matena suno brilis tiel juna kiel se ĝi estus novnaskita, la aero sentiĝis forta kaj eldormita, la roso forvaporigis kaj ĝia freŝaodoro malvarmigis la etan vizaĝon.

Kiam ŝi eniris la arbaron, ŝi renkontis verde vestitan maljunulon.

"Bonan tagon, Liceno," diris la maljunulo. "Mi estas la ĝardenisto sur Sunmaldensejo. Venu, kaj vi vidos miajn florojn!"

"Tro granda honoro por mi," respondis Liceno.

"Ne, ĉar vi neniam suferigis plantojn."

Do ili iris kune kaj venis al la lagorando. Tie estis eta bela ponto, kiu iris al insuleto, kaj tien ili iris.

Estis ĝardeno! En ĝi estis ĉio, granda kaj malgranda, kaj estis ordigita kiel en libro.

Li mem loĝis en domo, konstruita el kreskantaj ĉiam verdaj arboj, pinoj, piceoj, juniperoj kun ĉiuj branĉoj; la plankoj estis faritaj el kreskantaj ĉiam verdaj arbustoj kaj herboj. Muskoj kaj likenoj kreskis en la plankaj fendoj, por ke ili estu densaj; empetroj, arkostafiloj kaj lineoj estis la planktabuloj. La plafono konsistis el serpentumaj plantoj: virgulina vino, kaprofolio, klematidoj, hedero; kaj estis tiel dense ke ne penetris eĉ unu pluvoguto. Ekster la pordo staris abelujuj, sed anstataŭ abeloj loĝis tie papilioj. Kaj kiam ili svarmis, estis io por vidi.

"Mi ne ŝatas suferigi abelojn," diris la maljunulo. "Kaj cetere, ili estas tiel malbelaj; ili ja aspektas kiel harkovritaj kafograjnoj, kaj ili ankaŭ pikas, kiel vipuroj."

Kaj ili eliris en la ĝardenon.

"Nun vi legos en la ABC-libro de la naturo, vi scios la sekretojn de la floroj kaj la sentojn de la herboj. Sed vi ne rajtas demandi, nur aŭdi kaj respondi... Vi vidu, infano; sur ĉi tiu griza ŝtono kreskas io kio similas al griza papero. Tio estas la unua kio venas, kiam la monto iĝas malseka. La monto ŝimas; la ŝimon oni nomas likeno. Jen ni havas du; unu similas al la kornoj de la boaco; oni ankaŭ nomas ĝin boaca likeno, kaj ĝi estas la ĉefa manĝaĵo de la boaco. La alia nomiĝas islanda likeno kaj similas... Al kio ĝi similas?"

"Ĝi similas al pulmo, ĉar tiel estas skribite en la naturscienca lernolibro."

"Jes, sub lupeo ĝi similas al la aervezikoj de la pulmo, kaj tiel la homoj lernis uzi ĝin kontraŭ pulmaj malsanoj, vidu. – Kiam nun tamen la likenoj de la monto kolektis humon, tiam venas la muskoj. Ili havas iel pli simplajn florojn kaj kreskigas semojn; ili similas al la glaciaj floroj, sed vi vidos ke ili similas ankaŭ al eriko, kaj al pinglarboj kaj ĉio ebla, ĉar ĉiuj herboj estas parencaj. Ĉi tiu murmusko aspektas kiel piceo, sed ĝi havas semkapsulojn kiel la papavo, kvankam pli simplajn. Sur la muskoj baldaŭ kreskas la eriko. Se vi nur rigardas la erikon kun forta lupeo, vi vidas epilobion, aŭ rododendron, ĝuste kiel la ulmon, kiu estas nur granda urtiko. La humtapiŝo estas preta, kaj en vegeta tero

kreskas ĉio; la homo je sia profito kaptis kelkajn herbojn, sed la naturo mem diris al li kiujn li prenu kaj kiel ili estu uzataj. Tio ne estas pli strange ol la ornamoj kaj koloroj kiujn la plantoj ricevis por diri al la insektoj kie estas la mielo. Vi mem vidis sur la sekala spiko, kie la iloj de la bakisto pendas ekstere kiel bakistoŝildoj. Kaj se vi rigardas la linon, la plej utilan de ĉiuj herboj, tiam li mem instruis al la homo ŝpini. Nur rigardi en la floron kaj vi trovas la linotufon, kie la polvokordoj turnas sin ĉirkaŭ la stiluso. Por esprimi sin pli klare, la naturo lasis etan parazitan herbon turni sin ĉirkaŭ la tuta herbo, supren kaj malsurpen, tien kaj reen kiel la naveto en la teksilo. Strange estas ke ne estis homo, sed papilio, kiu unue trovis ke la lino estas ŝpinebla. El la folioj, la linuzanto ŝpinas per sia propra silko etajn kovrilojn kaj litotukojn al siaj infanoj. Sed kiam oni komencis kultivi la linon, li estas sufiĉe ruza por atenti la tempon, kaj liaj etuloj estas flugpretaj baldaŭ antaŭ ol oni tiras la linon.

Kaj la sanigaj herboj, vi imagu! Rigardu tiun grandan papavon; fajre ruĝa kiel la febro kaj la frenezeco! Sed plej sube en la floro estas nigra kruco; tio estas la venen-etikedo de la apotekisto. Kaj en la mezo de la kruco estas romia vaso kun kaneloj. En tiuj kaneloj oni gratas, kaj elfluas la sanigilo, kiu povas doni la morton, se malbone uzata; sed se bone ĝi povas doni la ĝentilan fraton

de la morto, la dormon. Jes, tiel saĝa kaj donema estas la naturo. Sed nun ni rigardu la Orpudron! ..."

Ĉi tie li faris paŭzon por vidi ĉu Liceno estis scivolema. Sed ŝi ne estis.

"Nun ni rigardu la Orpudron!"

Ankoraŭ paŭzo! Ne, Liceno povis silenti, kvankam ŝi estis tiel malgranda.

"Nun ni rigardu la Orpudron, kiu havas la florojn de la alĉemilo kaj la foliojn de la saksifrago. Tiel ŝi aspektas, kaj diras kie estas la fonto. La alĉemilo kolektas kaj roson kaj akvon en siaj folioj, estas mem eta klara fonto; sed la saksifrago eksplodigas montojn. Sed sur montoj vi ne havos fonton, kaj la monto estu kiom ajn malproksima. Tion la Orpudro diras al tiuj kiuj komprenas. Ŝi kreskas sur ĉi tiu insulo, kaj vi eksciuj la lokon, ĉar vi estas ĝentila. El via eta mano, la riĉulo ricevu la freŝan akvon por sia seka animo, kaj per vi, ĉi tiu insulo estos beata. Iru en paco, infano mia. Kiam vi iros en la nuks-arbaron, vi trovos arĝentan tilion dekstre; sub ĝi kuŝas angviso, kiu similas al serpento sed ne estas danĝera. Li montros al vi la vojon al la Orpudro. Sed antaŭ ol vi iros, vi donu al la maljunulo kison, tamen nur se vi mem volas."

Liceno streĉis sian etan buŝon al la maljunulo kaj kisis lin. Tiam lia vizaĝo aliiĝis, kaj li staris tie kvindek jarojn pli juna.

"Mi kisis infanon, mi ricevis junecon!" diris la ĝardenisto; "kaj vi ne ŝaldas al mi dankon. Adiaŭ!"

Liceno iris en la nuks-arbaron. Tie ludis la arĝenta tilio, kaj la burdoj kantis en ĝiaj floroj. La angviso jes ja kuŝis tie, sed li aspektis iomete verdiĝinta.

"Jen Liceno kiu havos la Orpudron," diris la angviso. "Vi ricevos ĝin, sed sub tri kondiĉoj: ne klaĉi, ne mensogi, ne esti scivolema. Nun iru rekte antaŭen, kaj vi trovos la Orpudron."

Liceno iris rekte antaŭen. Tiam ŝi renkontis sinjorinon.

"Bonan tagon," diris la sinjorino. "Ĉu vi estis ĉe la ĝardenisto sur Sunmaldensejo?"

"Bonan tagon, sinjorino," respondis Liceno kaj iris plu.

"Vi almenaŭ ne klaĉas," diris la sinjorino.

Kaj ŝi renkontis ciganon.

"Kien vi iras?" demandis la cigano.

"Mi iru rekte antaŭen!" respondis Liceno.

"Tiam vi ne mensogas!" diris la cigano.

Kaj ŝi renkontis laktoportiston. Sed ŝi ne povis kompreni kial la ĉevalo sidis en la veturilo, kaj la laktoportisto estis ligita al la timonoj kaj tiris.

"Nun mi kuregos," diris la portisto kaj komencis kuri, tiel ke la ĉevalo falis en la fosaĵo...

"Nun mi donos akvon al la sekalo," diris li kaj

forigis la kovrilon de laktobutelo por verŝi akvon al la tero.

Liceno ja trovis tion stranga, sed ne rigardis tien, sed pluiris.

"Kaj vi ankaŭ ne estas scivolema," diris la laktoportisto.

Kaj nun, liceno staris ĉe montoradiko; la suno brilis inter la aveluoj sur verda kordo de la sukplena herbo, kiu brilis kiel la plej klara oro.

Tie estis la Orpudro, kaj Liceno vidis kiel ŝi sekvis la akvon el la monto malsupren al la herbejo de la riĉulo.

Tiam ŝi genuiĝis, kaj prenis tri orpudrojn, kiujn ŝi kaŝis en sia antaŭtuko; kaj kun ili ŝi iris hejmen al sia patro.

La dragono surprenis la kaskon, la sabron kaj la puloveron; kaj tiel ili iris al la pastro. Poste ili iris ĉiuj tri al la riĉulo.

"Liceno trovis la Orpudron!" diris la pastro kiam li pasis la salonan pordon. "Kaj nun la tuta vilaĝo estas riĉa, ĉar nun ĝi estos banejo!"

Kaj ĝi iĝis banejo; venis vapora boato kaj komercisto; tie iĝis gastejo kaj poŝtoficejo, kuracisto kaj apoteko. La oro dum la someroj fluis en la vilaĝon, kaj tio estis la fabelo pri la Orpudro, kiu povis faris oron.